



**Attila József**

(1905-1937)

**Purakore**

**Poemoj**



Attila József  
**Purakore**  
Poemoj



**Attila József**

**Purakore**  
**Poemoj**

Tradukis: Imre Szabó

Zalaegerszeg  
Humana Europo-Asocio  
2006

Tradukis: Imre Szabó

Redaktis: József Baksa  
András Bágyi  
József Horváth

Apogis: Ministerio pri la eksteraj  
aferoj Hungara Respubliko  
Támogató: Magyar Köztársaság  
Külügyminisztériuma

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

© Szabó Imre

© Humana Eŭropo-Asocio (eldono)

Eldonis: Humana Eŭropo-Asocio  
8900. Zalaegerszeg, Iskola köz 3.  
Telefono: 06 70 450 1650  
Interreto: [sojtor@t-online.hu](mailto:sojtor@t-online.hu)  
Konto: 75500258-10820672

Dankon al ĉiuj apogantoj.

ISBN 978-963-87500-0-6

Presarto, tipografio: Fondaĵo de Profesikomencantoj  
Presejo Gura

# Enhavo

1

Curriculum vitae	10
<i>1922</i> .....	<i>15</i>
Malsato	16
Mallaŭta vespera psalmo	16
<i>1923</i> .....	<i>18</i>
Ad sidera	19
Voja invito	19
Ni krias al Dio	20
<i>1924</i> .....	<i>22</i>
Ŝtonoj	23
Okjaraj knabinoj	24
Milda, adiaŭa sinjorino	24
Ne mi krias	25
Kiom bone estus ne rebati	26
Mi ŝipos al Peŝto	26
Amara	27
Nun blankas la fajro	28
(Foj-foje insuloj)	29
(Mi mem ĵetis)	30
Ekrazitmaso	30
(Mi nomas ŝin Ria)	31
Sur vesperaj nuboj	32
Je kilometroj	33
Viroj de venontaj tempoj	34
Diamanto	34
<i>1925</i> .....	<i>36</i>
Purakore	37
Maturiĝas la lumo	37
Stulteta poeto	38
Naiva kanto	39
Mi fariĝos ĝardenisto	40

Attila József	41
Malĝoja	41
Kanto de fajroj	42
Frumatene ŝi ellitiĝas, kiel bakistoj	43
(Pri grandaj urboj rakontis la fora vaganto)	44
(La grandajn urbojn)	44
Junlaboristo	45
Laboristo	46
Mi portas mian teron	46
(Hungario estas fore fore)	47
Sonorigisto de la laga turo	48
Ruĝokula	48
(Vi estas tiel freneza)	49
Dio	50
Piloto	51
Forĝisto	51
(Leono travidebla)	52
<i>1926</i> .....	<i>53</i>
La teamo	54
La krabo	55
Invitado	55
Alvenis nur la maro	56
La geamantoj haltis silente	57
Ŝtalglobo supren, supren! Leviĝu!	57
(En la diskon leviĝantan mi celĵetas)	58
Kanteto	59
(Nuda bando monte stamfadas)	59
Ne frapante la pordon	60
Fortiĝas	60
(Mi malsanas)	61
(Mortis panjo)	62
Mi prenos ŝin	62
Kirasa trajno	63
La ĉiela kirastrajno	64
Min la mondo se forpelos	64



Glaso	65
Floroj	65
Muĝu turo	66
Mi koleras por vi, ne kontraŭ vi	67
Havos siajn florojn	67
Ribelo de geamantoj	68
(Ho, pretaj sibli kaj konsili)	69
Formiko	70
Viaj haroj miafingre	70
Sidi, stari, murdi, morti	71
Ili ekdancas	72
Kvaropo plonĝis	72
Du floretojn	73
Tintilo	74
Pluvas	74
Socialistoj	76
Oni min entombigas	77
La ĝardeno	77
Begle mi skribos	78
Inter mirantaj skaraboj	78
Kulturo	79
Oni min entombigas	79
Alvenigo de la leono	80
Patrino en vestlavado	81
<i>1927</i> .....	<i>82</i>
Proletkanto	83
Maldeca kanto	83
Enkonduko	84
Ho Vi, Eŭropo...	85
Andor Németh	85
Kanto en Kiszombor	86
Mi benas vin per tristo kaj gajo	86
Pariza bildkarto	87
<i>1928</i> .....	<i>88</i>
Du poemoj	89

Attila József	90
Svingajupe	90
Lagolule	91
Luca	91
(Mi estis por ŝi)	92
Lulado	92
Frunkaresu	93
<i>1929</i> .....	<i>94</i>
Bet-Leĥem	95
<i>1930</i> .....	<i>96</i>
Fumo	97
Amaso	97
<i>1931</i> .....	<i>99</i>
Mia patrino	100
Meditante	101
Frosto	102
<i>1932</i> .....	<i>103</i>
Urboranda nokto	104
Flavaj herboj	107
<i>1933</i> .....	<i>108</i>
Senespere	109
Odo	110
<i>1934</i> .....	<i>114</i>
Sin lulas	115
<i>1935</i> .....	<i>116</i>
Lulkanto	117
<i>1936</i> .....	<i>118</i>
Epitafo por hispana kampulo	119
Ve, la pasia amo...	119
El-elsaltas	120
Du heksametroj	120
<i>1937</i> .....	<i>121</i>
Misteroj	122
Poemo, flugu...	122
Je mia naskiĝtago	123

Tiu legu...	124
Karulino malsana	125
Jen, mi jam trovis la hejmlandon...	125
Eroj	126

## Curriculum vitae (Aŭtobiografia skizo)

Mi naskiĝis en 1905, en Budapeŝto, mia religio estas grekortodoksa. Mia patro – iama Áron József – en mia tria jaro formigris el la lando, kaj min la Tutlanda Infansava Ligo donis al eduk-gepatroj en la vilaĝo Öcsöd. Tie mi vivis ĝis mia sepa jaro, tiutempe mi jam laboris, kiel kutime la vilaĝaj malriĉaj infanoj – mi paŝtis porkojn. Mia patrino – iama Borbála Pöcze – reportis min sepjaran al Budapeŝto kaj registrigis min en la dua klaso de la elementa lernejo. Per loĝejpurigado kaj vestolavado ŝi perlaboris la panon por ni: por mi kaj miaj du pli aĝaj fratinoj. Ŝi laboris en fremdaj hejmoj, ŝi forestis de matene ĝis vespere, kaj mi – sen gepatra kontrolo – evitis la lernejon kaj fariĝis strata bubaĉo. Tamen en la legolibro por la tria klaso mi trovis interesan historion pri reĝo Atilo, kaj ekde tiam min plene absorbis la legado. La fabeloj pri la hunara reĝo interesis min ne nur tial, ĉar ankaŭ mia nomo estis Attila, sed tial same, ĉar la eduk-gepatroj en Öcsöd nomis min Pista. Post konsiliĝo kun la najbaroj ili konstatis antaŭ mi, ke la nomo „Attila” ne ekzistas. Tio multe konsternis min, mi sentis, ke ili pridubis mian propran ekziston. La malkovro de la fabeloj pri reĝo Atilo – mi kredas – de tiam baze influis ĉiujn miajn stre-badojn, finfine eblas, ke ĝuste tiu travivaĵo kondukis min al la literaturo, tiu travivaĵo transformis min en pensanton, en homon tian, kiu aŭskultas la opinion de ĉiuj aliaj, tamen interne, en si mem, kontrolas ilin analize: en homon, kiu obeas al la nomo Pitsta, dum ne praviĝos tio, kion li mem pensis, ke lia nomo estas Attila.

En mia naŭa vivjaro eksplodis la mondmilito, kaj nia vivteno fariĝis pli kaj pli malfacila. Mi prenis parton en la vicostarado antaŭ vendejoj – okazis, ke vespere je la naŭa horo mi komencis stari en la vico atendanta antaŭ la nutraĵuzino, kaj je la sepa kaj duono matene, kiam sekvis jam mia vico, oni anoncis antaŭ mia nazo, ke la graso elĉerpiĝis. Mi helpis la patrinon, kiel mi povis. Mi vendis akvon en la kinejo Világ. Mi

ŝtelis lignon kaj karbon en la stacidomo de Ferencváros, por ke ni havu per kio hejti. Mi faris buntajn rotaciajn paperstelojn kaj vendis ilin al infanoj kun pli bona sorto. Mi portis korbojn, pakajojn en la foirhalo ktp. Somere de 1918 mi feris en Abbazia pro la bonvolo de la infanferiiga kampanjo de reĝo Karlo. Mia patrino jam malsanis, ŝi ekhavis tumoron en la utero, kaj tiam mi mem aliĝis ĉe la Infansava Ligo – por mallonga tempo mi estis portita al Monor. Reveninte al Budapeŝto mi vendis gazetojn, mi komercis per poŝtmarkoj, poste per bluaj, blankaj kaj poŝtaj monbiletoj – kvazaŭ iu eta bankiero. Dum la rumana okupacio mi estis panvendista knabo en la restoracio Emke. Intertempe – finstudinte kvin jarojn en elementa lernejo – mi ekfrekventis kvarklasan duagradan lernejon.

Kristnaske de 1919 mortis mia patrino. La instituto por orfoj komisiis mian prizorgon al mia bofrato, la ĵus mortinta doktoro Ödön Makai. En iu printempo kaj somero mi servis sur la trenŝipoj Vihar, Török kaj Tatár de la Marnaviga Asocio „Atlantica”. Tiam mi ekzamenigis min private pri la materialo de la kvara klaso de la duagrada lernejo. Poste mia zorganto kaj d-ro Sándor Giesswein sendis min al la Saleziaj franciskanoj en Nyergesújfalu – por ke mi fariĝu pastro. Tie mi pasigis nur du semajnojn, ja mi estas grekortodoksa kaj ne katolika. De tie mi iris al Makó en internulejon, kie mi baldaŭ ricevis senpagan lokon. Somere mi instruis por tranoktado kaj manĝado en Mezöhegyes. La sesan klason de la gimnazio mi plenumis eminente, kvankam pro puberaĝaj perturboj mi plurfoje provis suicidon, ĉar verdire nek tiam, nek pli frue staris apud mi iu kiel helpeme orientanta amiko. Jam aperis miaj unuaj poemoj; la versaĵojn, verkitajn en la 17-a jaraĝo publikigis la revuo Nyugat (Oriento). Oni konsideris min infano mirakla, kvankam mi estis nur orfa.

Post la fino de la sesa klaso mi forlasis la gimnazion kaj la intemulejon, ĉar pro la soleco mi sentis min tre senfara: mi ne lernis, ĉar jam per la klarigoj de la profesoroj mi sciis la lecionojn, ja pri tio pruvis mia eminenta atestilo. Mi iris fariĝi

maizkampogardisto, kampara taglaboristo en Kiszombor, kaj dungigis kiel ĉedoma instruisto. Laŭ la peto de miaj du karaj profesoroj mi tamen decidis trapasi la maturekzamenon. Pri la materialoj de la sepa kaj oka klasoj mi faris kuntiritan ekzamenon, kaj tiel mi finis unu jaron pli frue ol miaj samklasanoj. Tamen por la lernado mi havis entute nur tri monatojn, kaj tiel okazis, ke pri la sepa klaso mi ricevis nure bonajn, kaj pri la oka nure kontentigajn klasifikojn. Mia atestilo pri la maturekzameno estas jam multe pli bona ol tiu pri la oka klaso: mi ricevis kontentigajn klasifikojn nur pri la hungara lingvo kaj historio. Tiutempe jam komenciĝis proceso kun akuzo pri blasfemo kontraŭ mi pro iu mia poemo. La apelacia tribunalo absolve min.

Ioman tempon poste mi estis libroagento ĉi tie en Budapeŝto, kaj en la periodo de la inflacio mi oficis en la privata banko Mauthner. Post la enkonduko de la sistemo Hintz mi estis dungita en la librotenejo, kaj mallonge poste – por kaŭzi koleron al miaj pli aĝaj kolegoj – mi estis komisiita kontroli, kiuj valoroj estas emisieblaj en la kasotagoj. Mian strebadon iom subfosis, ke krom mia propra laboro miaj pli maljunaj kolegoj ligis al mia kolo ankaŭ parton de sia laboro. Ili cetere neniam preterlasis la eblon inciti min pro miaj poemoj aperantaj en la gazetoj. „En tiu aĝo ankaŭ mi mem verkis poemojn” – diradis ili ĉiuj. La banko iom poste bankrotis.

Mi decidis fariĝi verkisto definitive kaj krome akiri iun civitanan profesion, kiu estas forte ligita al la literaturo. Mi enskribiĝis al la fakoj hungara-franca-filozofio de la fitoioĝia fakultato en la universitato de Szeged. Mi prenis 52 studhorojn semajne, kaj ekzameniĝis pri 20 eminente. Mi vivis de tago al tago, kaj pagis la loĝadon el la honorario de miaj poemoj. Min tre fierigis, ke mia profesoro Lajos Dézsi deklaris min merita memstare esplori. Tamen ĉiujn miajn emojn fiaskigis, ke profesoro Antal Horger, ĉe kiu mi devus trapasi ekzamenon pri hungara lingvistiko, vokis min al si, kaj antaŭ du atestantoj – eĉ nun mi scias ilian nomon, ili estas jam profesoroj – li deklaris, ke mi, ĝis li ekzistos, neniam fariĝos mezlerneja profesoro, ĉar

al homo – li diris tiel –, kiu verkas tiajn versaĵojn", kaj li montris al mi numeron de la gazeto „Szegeed", ni ne povas komisii la edukadon de la venontaj generacioj". Oni ofte mencias la ironion de la sorto, kaj ĉi tie temas ĝuste pri ĝi: tiu mia poemo, „Kun pura koro” estas ĝia titolo, tre disfamiĝis, oni verkis pri ĝi sep artikolojn, Lajos Hatvany pli ol unu fojon deklaris ĝin dokumento de la tuta postmilita generacio „por la malfruaj epokoj", kaj Ignotus „en la animo dorlotis, karesis, murmuris kaj zumetis" tiun mirinde belegan" poemon, kiel li skribis pri ĝi en Nyugat, kaj li nomis tiun poemon en sia „Arto poetika" kiel modelon de la nova poezio.

En la sekva jaro – tiam mi estis dudekjara – mi iris al Vieno, registrigis min en la universitato kaj vivtenis min vendante gazetojn ĉe la enirejo de Rathaus-Keller kaj purigante la ejojn de la studentoj de la Viena Hungara Akademio. La direktoro Antal Lábán, informiĝinte pri mi, ĉesigis tion kaj certigis por mi privatajn studentojn; mi instruis du filojn de Zoltán Hajdú, ĉefdirektoro de la Angla-Aŭstra Banko. El Vieno – el la terura mizerulejo, kie dum kvar monatoj mi ne havis eĉ litotukon – mi alvenis rekte en la kastelo Hatvany en la urbo Hatvan kiel gasto, poste la sinjorino de la domo, Albertné Hirsch, provizis min per vojaĝkostoj, kaj somerfine mi vojaĝis al Parizo. Tie mi enskribiĝis al Sorbonne. La someron mi pasigis en iu fiŝista vilaĝo sur la marbordo en Sud-Francio.

Poste mi venis al Budapeŝto. Mi studis du semestrojn en la universitato de Pest. Mi tamen ne trapasis profesoran ekzamenon, ĉar – pensante pri la minacoj de Antal Horger – mi certis, ke mi ne ricevos profesoran postenon. Poste la Instituto pri Ekstera Komercio dungis min kiel hungaran-francan korespondiston, tuj ĉe sia ekfunkcio – referencon, mi opinias, volonte donos sinjoro Kóródi, mia estinta ĉefdirektoro. Sed tiutempe neatendite min trafis plagoj, kiujn – kiom ajn hardis min la vivo – mi ne eltenis: la Nacia Oficejo de Sociala Asekuro sendis min unue en sanatorion, poste hejmen, kie mi plu malsanis ricevante vivtenan salajron pro neŭrastenio grava. Mi forlasis mian oficon, komprenante, ke mi ne rajtas esti

ŝarĝo sur la ŝultro de nova institucio. Ekde tiam mi vivtenas min per verkado. Mi estas redaktoro de la literatura kaj kritika revuo Szép Szó (Bela Vorto). Krom mia hungara gepatra lingvo mi skribas kaj legas france kaj germane, korespondas hungare kaj france, mi estas perfekta tajpisto. Mi sciis ankaŭ stenografi – per unumonata ekzercado mi povus refreŝigi ankaŭ tiun mian kapablon. Mi kompetentas pri prestekniko, povas ekzakte koncepti. Mi opinias min honesta, mi pensas, ke mia komprenkapablo estas rapida kaj mi estas persista en la laboro. (1937)



***1922***

## **Malsato**

### *Éhség*

Maŝinopaŭzo. Polvo malrapide  
sin kirlas supre kun aŭtunvaporo  
kaj falas al ĉiu kurbita kolo:  
la homoj manĝas. La ĉemizoj ŝvite

malvarmas. Voras ĉiu plenavide.  
Kukumoj, pano estas por la voro,  
ŝpareme ili manĝas kun honoro –  
tuj mordo sekvas mordon sendivide.

Pro tempo ili ne plu maltrankvilas.  
La mordo ritmas, samas kaj senŝanĝas,  
sed ili maĉas ĉiun pecon plene.

Per kamparanaj pulmoj, ili spiras  
la fojnodoron, polvon anheleme  
kaj manĝas, manĝas, ne parolas, manĝas.

## **Mallaŭta vespera psalmo**

### *Csöndes estéli zsoltár*

Ho, Sinjoro, mi ne kapablas forĝi Vian gloron en rimojn.  
Per simplaj lipoj mi murmuras mian psalmon.  
Sed se Vi ne volas, ne aŭskultu mian voĉon.

Mi scias, ke verdas herboj, sed mi ne komprenas, kial ili  
verdas, kaj por kiu ili verdas.  
Mi sentas, ke mi amas, sed mi ne scias, kies buŝon  
brulvundos mia buŝo.  
Mi aŭdas, ke blovas la vento, sed mi ne scias, kial gi blovas,  
kiam mi malĝojas.  
Sed ne priatentu mian voĉon, se ĝi ne plaĉas al Vi.

Nur simple, pnmitive mi ŝatus nun rakonti al Vi, ke ankaŭ mi ekzistas, kaj mi estas ĉi tie, kaj mi admiras Vin, sed ne komprenas.

Ĉar Vi ne bezonas niajn admirojn kaj niajn psalmadojn.  
Ĉar ofendas eble Viajn orelojn la bruaj kaj eternaj preĝoj.  
Ĉar ni povas fari nenion alian, nur preĝi kaj humiliĝi kaj petegi.

Mi estas Via simpla sklavo donacebla eĉ al la Infero.

Via regno estas senlima, kaj Vi potencas, kaj Vi fortas, kaj Vi eternas.

Ho, Sinjoro, donacu al mi mian povran memon.

Sed se Vi ne volas, ne aŭskultu mian voĉon.

*1923*

## **Ad sidera**

### *Ad sidera*

Vi, panjo, jam senlima malproksimo,  
vin jam, se mankas pano, ne ĉagrenas,  
vi ne plu palas, se vespero venas  
veante sangon kun malsato-timo.

Vi, panjo, jam silenta malproksimo,  
vi ne alturnas nube la okulojn,  
ne vidu plumbopugni la torturojn –  
pro kiuj muĝas ĉi-batita sino.

La vivo eĉ panpecon ne valoras!  
Tamen, mi kredas – la futuro gloras:  
por pano ne plu ploru infangorĝo,  
sed povu plorfunebri la patrinon.

Ne suferigu plu la Homan sinon  
la Mono.

## **Voja invito**

### *Útrahívás*

Vian bildon onde de praaj ritmoj  
lasu porti, ho belulino eta.  
Vokas min murmure la malproksima  
mar' nekonata.

Vian molan ombron inundoj lulas,  
al la vojo jam la boato ekus!  
Min kun mil belaĵoj atendas fora,  
virga haveno.

Venu – ĝia bordo belegu per vi;  
faru pli hejmeca la murojn krudajn  
via juna ĉarm' karesanta per la  
lumaj okuloj!

Venu – tra la vojo farose brilos  
miaj revoj en ĉielarko, kiam  
vespervene ŝvebos atinge zoni  
vin la sopiroj.

Venu, ĉar eĉ sen vi ekiros mi jam!  
Ba, petegi! Venu aŭ rabos vin mi!  
Kia! do frakasu la noblan volon  
stulto knabina?

## **Ni krias al Dio**

*Kiáltunk Istenhez*

Dio!

Ni krias al Vi:

iĝu nia senta, varma haŭto,  
ĉar ni estas senhaŭtigataj,  
kaj pro la doloro ni nenion vidas,  
kaj vane, vane ni palpadas,  
ni ne plu sensas la aĵojn,  
nur tion, ke ili doloras terure.

Kiom valoras, se ni scias, sed ne vidas,  
ke el ni ekflagras printempe la burĝono,  
ke pli heroas niaj brakoj ol la laciĝo,  
ke pli eksplodigas nia cerbo ol dinamito,  
Ekbruletas lano de niaj vortoj,  
kaj ia vento disportas ilin kiel amaran fumon,  
ĉar neniu kovras sin per ili.

Nia animo elfluas el ĉiuj,  
kiel lakto el la rustotruitaj kruĉoj.  
Tamen per amo ni kazeigas ĝin,  
por ke ĝi restu almenaŭ por la filoj,  
sed nun vi povas demeti de sur vi !a stelojn,  
ĉi tie la brilo de groŝoj pli daŭremas.

Kaj neniu akceptas nin al la tablo,  
ni maĉas tubajn radikojn de montoj,  
eĉ surĉiele brilas ne suno, sed talero ora.  
Surkampe eŭforbioj ne plu maturiĝas.  
Ho, iĝu nia senta, varma haŭto,  
por ke la doloro gute defalu de sur ni,  
kiel akvo de sur la plumaro de anseroj,  
por ke ni fine povu pretĉizi  
la marmorstatuon kaj la lignobenkon –  
Ni ne volas, ke tio restu por morgaŭ,  
kaj sur la akvoj jam tagmezumas la nuboj,  
ekde nun multiĝos nur la ombroj,  
sen plenumi la laboron ni devas rehejmiĝi  
por tranokti sub Viaj fermoĝantaj palpebroj.

*1924*



## Ŝtonoj

### *Kövek*

Maljunaj ŝtonoj, vi, min ne koleru,  
se vin mi tretas plande nur toleru,  
ĉar mi mem estas la tretant' movanta.

Kunfratoj aĝaj, nun vin mi alvoĉas:  
tretant' pli mova, granda min surtretas  
kaj mute marŝas sur la homoŝtonoj,  
senvortas aŭ mesaĝas nur per signoj –  
vi estas eble liaj pezaj vortoj?  
Ho mutaj, ankaŭ vin mi ne komprenas!

Kial la ŝtono, se ne por domiĝi?

Ĉu ne plu helpas veo, haleluja?  
Nek fido-stukoj? nek Kristo-mortero?  
Disfalis jam la homo je mil pecoj,  
kiel en pluvo la adobkabano.  
Kaj kie la blokŝtone forta homo,  
kiun ne tretas plandoj doloranta?  
Terure tiel apudvoje kuŝi,  
se ne konstruos nin je metropoloj,  
granitamasoj iu konstruanto.  
Ja en bubaĝo de !a tempo estis  
ni grotaj montoj interbrakumantaj,  
ni estis hejmo por la paco, amo.

Disrompis nin la saĝo kaj la bomboj,  
nin diserigis gejserkurra sango,  
mergante sin en larmojn jam cent cerboj  
savante bolas, kiel mem la kalko,  
por nin altigi en senplenajn urbojn,  
ĉar por ni sola-ĉiu senco estas  
doloro de !a ŝtonoj sur la strato,  
kiuj tretataj en malpuro-polvo  
sopiras en kupolon preĝejturan!

## **Okjaraj knabinoj**

### *Nyolcesztendő's lányok*

Venas, iras ili svarme,  
koboldidoj, etaj, sanktaj,  
ĉies frunto varma pano,  
la okuloj karbobrag'.

Venas, iras ili svarme,  
ili amas kiel floroj,  
tiel amas ili knabojn,  
sam-samkiel la konval'.

Venas, iras ili svarme,  
eĉ plorante ili ridas.  
Ili foras, jam tre foras,  
kiel foras la stelar'.

## **Milda, adiaŭa sinjorino**

### *(Szelíd, búcsúzó asszony)*

Ŝi portas siajn kisojn al la foroj,  
iĝis fakiro; ne plu amebriu;  
ŝi vadas ondajn kampojn de violoj,  
sed floron ŝi ne donas jam al iu.

Mi volis: estu ŝi la brila ombro,  
fiergracia, gaje min sekvanta,  
sed la ĉielon kovris bruna sombro,  
kaj brilo ŝia iĝis tristo hanta.

Sed mi trankvilas, kiel la senlimo  
aŭ arbfolio sur la muĝa maro,  
neniu kun mi estos jam virino,  
se mi ridete rektus al l' homaro.

La muroj ploris senesperan ploron,  
baroj de mia sorto el sensuno,

ploreĝis ne mi, kiam hakis koron:  
jen, adiaŭo, ne plu jam plenumo.

Malpezu por ŝi la memor' odore,  
eterne ŝvebu plene al ĉielo,  
dum ŝtiparrozoj flagros miakore,  
dum braĝos mia amo en ofero.

## **Ne mi krias**

*Nem én kiáltok*

Ne mi krias – la tero tondras,  
gardu vin, gardu vin, ĉar ekfrenezis la satano,  
premu vin en la purajn fontoprofundojn,  
premu vin en la vitrolamenojn,  
kaŝu vin sub la brilo de la diamantoj,  
inter la skaraboj sub ŝtonoj,  
ho, kaŝu vin en freŝaroma pano,  
vi povra, vi povra.  
Per freŝaj torentoj penetru en la teron –  
vane vi banas en !a propra  
nur en fremda memo vi povas lavi la vizaĝon.  
Estu sur herbo la akro malgranda  
kaj vi grandos pli ol la akso monda.

Ho, maŝinoj, birdoj, branĉoj, steloj!  
Nia patn' senida fekundecon ploras.  
Amiko, kara, amiko amata,  
estu terure aŭ edife,  
ne mi knas – la tero tondras.

## **Kiom bone estus ne rebati**

*Milyen jó lenne nem ütni vissza*

Kiam estas ni batataj grave,  
kiom bone estus ne rebati:  
nek permane, nek pervorte,  
lumi kun la taglumo,  
endormiĝi kun la nokto,  
voĉi per la voĉo de malkuraĝo,  
sed neniam rebati.

Mi devus disputi kun miaj animoj,  
kaj nun vivanta estas mi la paco.  
Kristala riverakvo fluadas  
en la vejnoj diamantaj.  
Milda brilo la ĉemizo,  
kaj paco, paco ĉie,

kvankam nur mi mem vivas per ĝi! ...  
Levas min la sunradioj,  
Dio kisas ĉiujn miajn vizaĝojn,  
kaj grandaj, plensarĝitaj ĉaroj ekiras ei mi  
al la dezerto.

## **Mi ŝipos al Peŝto**

*Hajón megyek Pestre*

Ĝuste mil kronoj, mi ŝipos al Peŝto.  
Mi spektis ĝin ĝis plenlaciĝo,  
tamen mi spektus ĝin ankoraŭ,  
sed ekvesperis.

Pikas la kamenfumo, sed ne ĝene,  
ŝia hararo same krispas kaj densegas;  
sinsekve, kiel la du boatoj,  
eble pli sveltas ŝia arda talio,  
la nazo saltas, kiel ponto Elizabeta,

aŭ kiel tiu,  
kiu plonĝas de ĝi.

Ba, jam sufiĉ'!... Tamen strange,  
ke brilo de Peŝto similas al ŝiaj okuloj.  
Du turoj de Baziliko: ŝia mamduopo,  
kaj kiom da tiel grandaj fornegoj en ĝi!

Mi sentas min riproĉita,

sed certe, se mi estus tiom soifa,  
kiom strange nun mi fartas,  
tuj mi eltrinkus desub ni  
la tutan riveregon Danubo.

## **Amara** *Keserŭ*

Ho, radioaktiveco! nun mi legas, kaj mi  
manĝas akvomelonon, kaj mi forte  
scias,  
ke la mondo ŝanĝiĝas nur en ni mem,  
mi estas nure nur kolora knarilo, ĉu vi  
aŭdas? Mia vizaĝo travideblas,  
malantaŭ ĝi floroj flugadas, kiel ili  
elmergiĝas el la elektraĵoj.  
Ankaŭ de mia amatino disŝiras min la  
humanisma jarcento, ho, superita  
malĝojo, hodiaŭ nokte bruligu la  
azilejojn.  
La ŝafidoj estas stultaj, mi estas azeno, kaj  
nur mia longe etendiĝanta ombro estas  
la paŝtisto.  
Se mi fermas la okulojn, la aeroplanoj  
kraŝas, kaj ankaŭ tiuj,  
kiuj el mi soras ĉiutage.  
Vi, brila polvo, malfunkciigu viajn orajn  
motorojn, matene ja elbalaos vin la  
sinjorino.

Ho, la sinjorino, mia amatino nur ploras,  
kaj ŝiaj larmoj turnas plu la malnovajn  
turbinojn.  
Damaĝe, damaĝe pri ni,  
sed vivu la akriĝisto-lernantoj, kiuj  
fajfadadas  
eĉ ne sciante, ke la firmamento desuper la  
kapoj forvelis en la monujojn.

## **Nun blankas la fajro**

*Most fehér a túz*

Konsolu la suferajn vesperiĝojn, al ili apartenas  
ankaŭ mia karulino,  
kun siaj malĝojaj flamoj ŝi plorege kaptoludas.

Ŝi kuras antaŭ mi, mi kisis ŝin, kaj la tempo kun  
granda muto mergiĝas ĉirkaŭ mi,  
sed per malplena mano vane mi kaptadas al ŝi  
sur la blindiga surfaco de doloro.  
En tombejoj lumas elektra lampo,  
miaj larmoj lavas nigrajn diamantojn,  
mankas vortoj por eldiri,  
cindriĝis la restintaj revoj,  
nur malhelaj esperoj de murdistoj lumas jam.  
La stulteco eksprestrajne kuregas antaŭ mi,  
ĉiuj miaj birdoj estas flugiltonditaj.  
Ŝi estas tiel senkulpa, kiel la blanka frunto de gruzoj.  
Mi ĉiam nomis ŝin Ria.  
Ni eĉ maton malhavos, tamen ĝi estis eltirita desub ni,  
niaj festoj kuŝas svenante.  
Kantu, pura malĝojo,  
mi kuŝiĝos sur la lun-kuseno,  
Kantu, pura malĝojo,  
mi kuŝiĝos sur la lun-kuseno.

## **(Foj-foje insuloj)**

*(Néha szigetek)*

Foj-foje insuloj leviĝas en nia kapo,  
birdoj flugas super ili faligante semojn de  
novaj, mirindaj vegetaĵoj.  
Fluas ŝvito ankaŭ el vizaĝo de  
maŝinoj, larmoj el la okuloj de patrinoj,  
oleoperloj de nia laboro.  
Lante tiel turniĝas la mondo plu,  
hieraŭ mi kredis esti pirarbo, kaj eĉ  
hodiaŭ venas al mi etuloj,  
ili kisas min skuante en mi la pirarbon.  
Mian unuan amon mi metis en denaturitan  
alkoholon, kaj nun kelkfoje mi  
rigardadas, kiel stranga besto ĝi estis.

Saluton, saluton, kiel vi fartas, dankon, mi  
fartas, kaj vi, do, nur malrapide, tiam ni  
kvazaŭ eĉ ne havus sopirojn,  
sed frostotremante ni vagadas sur la supro  
de Mont Blanc-oj, kaj ni preĝas,  
dio, dio,  
kial vi ne kreis ankaŭ montojn.  
Mi donas min al vi, kiel patrino sian  
varman, plenan mamon al sia malsata  
etulo.  
La arbedoj jam dormas, ankaŭ mi  
ekkuŝas en vi, por ke matene estu  
ĉemane miaj ŝatataj, ŝtalfruntaj  
laboriloj.

## **(Mi mem ĵetis)** *(Ēn dobtam)*

Mi mem ĵetis min ĉi tien, en la koro de  
blinduloj senpaciencaj, sed nia intenco  
samas kun la radiumo.  
Jam-jam ni iĝas Jehovoj por nin krei homoj denove.

Tio estas la amo kaj la rojokorda kanto, kiu  
nun streĉas sin por atingi iel ĝis la  
maleolo de nia karulino.  
La ondolongo identas kun mia alteco, tial  
okazas, ke la kapturnajn sunsistemojn ni  
nomas kiso,  
ili turniĝas, kaj sub iliaj sonoraj, nigraj  
hararoj ridetas la preĝoj.

En peza dormo velkas la horoj,  
sed violĝardeno el ni flosas al la urbo  
ulnalte super ĝin,  
ekiras la trajno tien, kaj en la ombro de  
larvoj tien ŝrikas la sveltaj turoj.  
Do, pensu pri la harpokulaj gejunuloj, ili  
povraj,  
ne estas, kiu per freŝa, pura akvo klinus  
sin super ilian senkulpan vivon.

## **Ekrazitmaso** *Ekrazittömeg*

Kiu estos la birdo, se ni mortos, kaj la  
gemojn de mondoj ni ĉizados?  
La vojoj lante leviĝos, kaj ni rimarkos,  
ke ni marŝas sur la aero.  
Niaj erarintaj radioj reflugos en ovojn de  
sovaĝbirdoj.  
El forbrulintaj krioj konstruiĝas la polvo.  
Sur la surfaco de oceanoj ŝvebas penso



kuracante siajn lunatikajn fratojn.  
Kadavroj, nu ek, elsaltu el miaj amikoj,  
nian animon ni portas al suno por varmiĝi,  
sur pintoj de flamoj ni falas kaj leviĝas  
kun neelkoneblaj sekretoj,  
tiukvante vi poros, kiel la akvoj  
vaporiĝas,  
el nevideblaj lumfadenoj de herboj  
ni teksas stultetajn vortojn, kiuj malĝoje  
ridetas antaŭ la spegulo.  
Sed senindulge mi kredas miajn fortojn,  
mi forlasas miajn foriremajn malsatojn.  
Eminente  
obstina ekrazitmaso estas  
malantaŭ via vizaĝo la senvoĉa  
profundo kaj via koro,  
baldaŭ definitive sinkos en nin la  
masonfermitaj, flagrantaj, oraj pordoj.

## **(Mi nomas ŝin Ria)**

*(Riának hívom)*

Mi nomas ŝin Ria,  
sed mi povus nomi ŝin salo, eĉ fulmo.  
Ni faras multe da sensencaĵoj, ni diras pri  
ĝi: bela, kaj poste ni faligas ĝin el la  
mano.  
Ŝi estas ĉizita el rentgenlumo, ŝi  
traradias murojn kaj miajn vortojn.  
Ho, kiom tre ŝi foras!  
Kiam mi solas, ŝi sidiĝas antaŭ mia  
frunto, eble mi tre doloras ŝin,  
ŝi ĝemetas kaj faligas dolorojn sur mian  
korpon.

Mirinde, ke aliaj ne rimarkis la florojn  
super sia kapo,  
kvankam mi vidis, eĉ aŭdis, koloraj  
sonorilegoj estis ĵetataj dekstren-  
maldekstren,

al ni ridetas supren ŝiaj futuraj infanoj,  
ŝi iradas inter ni, ŝi zorgeme atentas pri  
ili, tamen ne konsciante pri tio,  
ŝi kredas tiam, ke ŝi purigas la ejojn aŭ min vokas  
vespermanĝi.

Ni estas du dentoj de agordforko,  
kaj tamen, se ni alrigardas nin,  
foje raŭke soras la malĝojo.

## **Sur vesperaj nuboj**

*Esti felhőkön*

Sur vesperaj nuboj kreskas nigraj herboj, ili  
absorbas lante la lumon, kaj  
diamantaeron ili aspergas al niaj  
ŝvitantaj vizaĝoj.

Trankvila spiro estas la mondo  
forŝvebanta super la glacimontoj.  
Tiam ili plene degelas.

Se ŝtonon ni ĵetas supren, neniam ĝi  
subfalas, sed iĝante kiso ĝi flugas per  
varmaj flugiloj supren, supren tute ĝis  
ni.

En niaj ostoj fosforeskas la medolo, kiel la  
Polusa Stelo,  
ĉe ilia duopa lumo ni ekvidas la akvon kaj  
panon, kiuj sin kaŝis en niaj polmoj.  
Kio estas la vero, mi demandas la murojn.  
Je tio ili malaperas, kaj sub la steloj vi  
ĉiuj sidos ĉirkaŭ mi.

La palpebroj estas el silkovetro, ili karesas  
eĉ fermiĝe, tamen ni vidas plu.  
La aloo ĉiusekunde floras en la sonĝoj.  
Ni dormas kun nia karulino nekonata, ŝi  
estas tiu, kiu nin karesante atentigas, se la  
kovrilo iom-post-iom deglitas.

## Je kilometroj

### *Kilométerekkel*

Je kilometroj ni antaŭas nin kaj ni svingas  
niajn perditajn animojn  
en kiuj vigilas la sopiroj  
Findancintaj maljunuloj nun eksidas en la lito  
Sekrete ili kapon pendigas sub la hararon  
por ke ili miksu la sensuspektajn  
pensojn  
Kvankam vanas ĉiu eksperteco kiam  
frumatena aero glitflugas  
tra mia koro  
Ĝi estas por ni kara al kiu ni devas danki  
flirtantan rideton de nia parulino  
Kaj tamen estas komplike kun fermitaj  
manoj iradi en la okuloj  
Ankaŭ la mondo pli multas se ni streĉas nin  
grandajn montojn grimpi  
Kaj profunde sub la ondoj flugas kabloj  
kiuj ĵetas en la maron  
siajn bastardojn  
Anĝelo vagadas sur mia langosurfaco  
Sur sparko-reloj ruĝaj lokomotivoj susurflugas for  
Okul-al-okule  
Ria pli sveltas ol la vespera ombro de lilio  
Sed sur mia taŭzita frunto ekfloras fajfiloj  
En okulfrakasaj rakedoj de streĉo ni suprenflugigu  
unikan klasbatalon  
de l' junularo

## **Viroj de venontaj tempoj**

### *Jövendő férfiak*

Ja ili estos forto kaj mildeco,  
ili rompos fermaskon de la scio  
por vidi ĝian animon survizaĝe.  
Ili kisos la panon, la lakton,  
ili karesos la kapon de la propraj infanoj  
kaj per la sama mano ili premos  
el la ercorokoj feron kaj ĉiujn metalojn.  
Ili konstruos urbojn e! la montoj,  
iliaj trankvilaj kaj enormaj pulmoj  
enspiros la ŝtormojn, la tempestojn,  
kaj sereniĝos ĉiuj oceanoj.  
Ili ĉiam atentos eĉ gaston neatenditan,  
ili primetos ankaŭ por li  
tablon kaj koron same.

Vi ĉiuj volu simili al ili,  
por ke viaj idetoj kun liliopiedoj  
senkulpe povu travadi  
la barantan sangomaron.

## **Diamanto**

### *Gyémánt*

La psalmoj ĉiutempe aktualas.

Ni statas sur monto diamanta,  
sed en la posoj estas ŝtoneroj.  
Tre forgesigis, ke ni anĝeloj estis iam,  
la blankajn flugilojn ni ŝtopis en dikajn kusenojn.  
Nun indulgo-poetoj soifas niajn fortojn,  
kaj subgenue la ŝtonoj frotiĝis truaj,  
en nia koro frostiĝis la stelo.  
Jes Jes.

Dronis la maristo-soldatoj:  
mildai pramistoj boatas al Dio.  
Eĉ la tre maljunaj sidiĝas  
sur la krudan benkon antaŭ la aĵoj,  
kaj ili predikas paciencon fore  
al la fiŝoj de pasemo  
Jes, Jes.

Do, ni ne kredu, amikoj,  
ke anstataŭ per pilkoj ni pilkludis per la propraj pugnoj!  
Oni devas karesi ĉion,  
eĉ la hienojn, eĉ la ranojn.  
Ni staras sur monto diamanta,  
severa neĝo, kovru niajn kulpojn,  
absolvu niajn langojn, ĉiela klaro!  
Vi senlima kristalo!

*1925*

## **Purakore**

*Tiszta szívvel*

Nek plu patro, nek patrin',  
Nek plu di', nek patrujsin',  
nek lulil', nek mortkovril',  
nek amanta kisobril'.

Faste venas tria tag',  
Malplenegas la stomak'.  
Dudek jaroj – jen potenc',  
Vendas ilin mi sen senc'.

Se neniŭ emos min,  
la diablo prenos min.  
Purakore krimos mi,  
Eĉ ne murdi timos mi.

Min kaptiton post pendum'  
Oni kovros per la hum',  
Por mortigi kreskos flor'  
Sur belega mia kor'.

## **Maturiĝas la lumo**

*Érik a fény*

Mi povas skui miajn arbojn, jam proksimas  
la gefratoj.

Arklampoj ni estas super koroj unu de la  
alia, ĉu vi vidas la birdetojn sur niaj  
ŝultroj?

Ni mem estas ili, kaj ankaŭ niaj mildaj  
vizaĝoj tuŝas unu la alian. –

Ni malfermu nin plene, samtempe ni ĉiuj  
eniru la amon!

Sur la Sunon ni pendigas niajn radiojn,  
liberiĝantaj panoj okupas niajn sojlojn,  
diamantpontoj altiĝas ĉie, kaj

ekdormintaj minoj alaŭde leviĝas en la  
korojn, kaj ili milde eksplodas en niaj  
kisoj.

Do, ni disipu niajn sonorilegojn, ni ridetu  
ĉe malfermitaj pordoj!  
En la okuloj sin kaŝas turo, de kiu mi  
travidas nekonatajn regionojn de patrujo.  
Pretas jam niaj firmamentoj, kaj ni pretas  
je la brilo,  
kiu matenvene kaŭzas graciajn florojn.

## **Stulteta poeto**

### *Balga kŭltŭ*

Ne ĉiuj estas dotitaj  
per stulteto flamanta en la herboj,  
mi scias bone, mi scias.  
Mi nur disipu, nur prodigu  
miajn malriĉon,  
honeston,  
la freŝan aeron,  
la turdojn,  
la abundgustajn sukojn de la kampoj,  
la kuradajn herbejajn florojn, kiuj surfrunte  
portas miajn revojn,  
kaj fripone sin frotas  
al maleoloj de henantaj ĉevalinoj.

Povus mi esti la masonisto, kiu  
brakumante  
krakigas la virinajn taliojn,  
domojn, prizonojn kaj preĝejojn li  
konstruas,  
sed li tagmeze ekripozas apud la brikoj,  
li manĝas la panon, lardon, cepon, streĉ-  
etendas la membrojn,  
laŭtspirante, glutante li trinkas akvon,



kaj li tuj dormas ridetante,  
kiel la plej saĝa, mortinta faraono.  
Povus mi esti ankaŭ librotenisto,  
kiu havas ĉefojn,  
aŭ tajloro, kiun oni ne envias,  
se li bone kudras jakon, kaj ĝi malbonas  
por la sinjorino,  
li laboras multe, sed li strikas,  
se malaltas la salajro.  
Povus mi esti migra ventroparolisto,  
ja tiom da birdoj ploregas, frapadas en mia  
koro,  
kaj oratoro orbuŝa,  
kiu staras sur la podio,  
li frapetas sian rondan ventreton,  
kaj li parolas pri la popola mizerego,  
kiun nur li sola povas distreti  
per siaj francmodaj duonŝuoj,  
kaj vivu! vivu! tondras la popolo,

ili trenas sin proksimen por pli bone aŭdi,  
kvazaŭ en granda, malhela tunelo  
dekmil eksprestrajnoj kolizius.  
Kaj pli bele mi povus stultige allogi!  
Povus mi esti ankaŭ kamparano, pastro,  
ermito, salondando, bankiero kaj reĝo!  
Akceptu de mi stultete, primitive  
mian stultetan, primitivan koron.

## **Naiva kanto**

### *Együgyű ének*

Junulo, dudek jara, samaĝulo,  
tre amas sian belan amantinon,  
tiel li amas ŝin, same kiel kuŝujon la  
rivero, en kiu la fiŝoj sin kaŝas en la  
ŝlimo, se ili laciĝas,  
li nur karesadas kaj tre amas ŝin,  
la ricevitajn florojn li donas al ŝi ĉiujn,

ankaŭ la panon li donas, li sola ne  
ektranĉas ĝin,  
li laŭtlegas al ŝi la gazeton kaj atendas  
ĝis ŝi ekdormos, poste ekdormas  
ankaŭ li mem,  
li helpas ankaŭ fari fajron, kaj fajfante li  
hakas la lignon –  
Se mi havus amantinon, ankaŭ mi tre  
amus ŝin,  
tute same, kiel la rivero sian kuŝujon.

## **Mi fariĝos ĝardenisto**

*Kertész leszek*

Arbojn plantos mi ĝardene,  
mi leviĝos freŝmatene,  
mi ne zorgos pri cetero  
krom pri floroj en libero.

Ĉiu mia eta floro  
tre valoros por la koro,  
eĉ se kelkaj vundojn faros,  
tamen por mi tre-tre karos.

Lakton trinkos, pipon fumos,  
la pretendojn mi plenumos,  
tiam plagoj min ne tretos,  
eĉ min mem mi planti pretos.

Tio gravas evidente  
oriente, okcidente –  
se pereos jam la mondo,  
ĝin sepultu flora rondo.

## **Attila József**

### *József Attila*

Attila József, kreu min, mi tre amas vin,  
tion mi heredis de la patrino, ŝi estis  
benate bona sinjorino, vi vidas, ŝi  
naskis min.

La vivon ni vane komparas al ŝuoj aŭ al  
kemia puriguzino, tamen ni ĝojas pri ĝi  
pro io cetera.

Ĉiutage po tri fojojn oni elaĉetas la  
mondon, sed ili eĉ alumeton ne povas  
fajrigi, se tiel daŭros, mi ne okupiĝos  
pri ili.

Estus bone akiri bileton kaj alveturi Nin  
mem, ke li loĝas en ni, estas tute certe.  
Ĉiumatene per akvo malvarma mi banas la  
pensojn, tiel ili iĝas freŝaj kaj  
sendifektaj.

El la diamanto kreskas bonaj, varmaj  
kantoj, se ni plantas ĝin sub nia koro.

Troviĝas iuj, kiuj estas perpiede eĉ  
surĉevale, aŭtomobile kaj  
flugmaŝine, mi ripozadas en la  
frumatena kanto de alaŭdoj, tamen mi  
transiĝis super la ravino.

Nian animon same, kiel la festajn vestojn,  
ni zorgeme konservu, por ke ĝi estu  
pura por la festoj!

## **Malĝoja**

### *Szomorú*

Desub la tablo supreniĝas la memoroj.  
Vento kaj pensoj estas la ŝpiro de  
mortintoj, kiu divenas ĝin?  
En mia amatino la knabinoj, sinjorinoj  
ĉiuj kuntiriĝas kaj frostotremas,

ie sufokiĝanto kaptadas por mi,  
mi ĵetas la kapon en polmon.  
Ho, tiu muziko de la herboj, ĉu vi vidis,  
ĝi tre belis.  
Per sia varma vizaĝo karesis min la tero,  
kun fermitaj okuloj mi kuŝas en ŝiaj  
okuloj, per ŝi mi vidas, min lulas spiro  
de bebo,  
kaj tiam iu disiĝas el la koro, tio tre  
malbonas.  
Hieraŭ posttagmeze ploris la kampo.  
Kio okazos al miaj superfluaĵoj?

## **Kanto de fajroj**

### *Tüzek éneke*

Ni dormas en la seka ligno, en la brila, abunda karbamaso,  
manoj de junedzino nin vekas,  
ni susuras en la kaldronoj, niaj fajreroj krakas,  
tiel ili kuras,  
ni donas ruĝon al la blonda ŝtono, grasaj viandopecoj  
kuiřiĝas  
super ni sub la bunta, stana fermoplato.

Sur la kampoj, paŝtejoj ni etendiĝas ĝis la nuboj,  
el niaj viglaj, sveltaj brakoj ekperlas la sango,  
ĝi laŭfluas niajn membrojn, malhela kaj dika,  
kiel la bruna humo, en kies utero fermentiĝas  
multe da bona graso,  
kiu fandiĝe,  
krepitante  
dismiksiĝas.

En plenaj vejnoj de belaj  
junuloj ni sterniĝas, en iliajn muskolojn ni ĵetas  
arbojn, fortajn, fleksiĝemajn branĉojn, kiuj  
en ĝangaloj jarcenton longe risortadas knarante,  
el ilia haŭto liberiĝas, bolas la suko,  
kaj enormajn, orajn bildojn ili levas al la  
ĉielo vastaspaca.

Ni estas tre amataj, en ĝisĉielan amason se ni  
kolektiĝas,  
kuran, liberan senbarejon plenigas la junuloj, junulinoj,  
en la belajn korojn susurflugas brilo,  
man-en-mane,  
tiel ili nin ĉirkaŭdancas digne,  
ili ridas ruĝajn flamojn, bele, pure ili maljuniĝas,  
kaj maljuniĝe  
siajn ŝrumpajn, etajn korpojn ili kise kuŝigas  
en niajn fortajn cindrojn.

### **Frumatene ŝi ellitiĝas, kiel bakistoj**

*Hajnalban kel fōl, mint a pékek*

La karulino estas fortatalia, svelta virino,  
mi sidis jam en flugmaŝino, el la alto ankaŭ ŝi  
vidiĝas malgranda,  
sed eĉ estante piloto mi estimus ŝin.

Ŝi mem lavas siajn vestaĵojn, la ŝaŭmo revante tremas  
sur ŝiaj brakoj,  
ŝi genuiĝas kvazaŭ preĝante, ŝi frotlavas la plankon,  
kaj ŝi kare ridegas, kiam finite,  
ŝia rido, kiel pomo, kiun ŝi ŝelan ekmordas,  
tiam ankaŭ ĝi laŭte ridegas,  
kiam ŝi knedas panon, frumatene ŝi ellitiĝas,  
kiel bakistoj, kiuj estas parencoj de la bone  
bakantaj fornoj,  
kun longaj ŝoveliloj ili gardostaras,  
la faruno batiĝas kaj alflugas ilian belan, liberan  
bruston, kie ĝi trankvile ekdormas,  
kiel mia karulino en la bonodora lito post  
finlavado de la vazaro,  
kaj post ke mian koron ŝi brakumis pura.

Ankaŭ mia edzino estos tia, se mi kreskos  
plena homo,  
kaj mi edziĝos, kiel mia patro.

## **(Pri grandaj urboj rakontis la fora vaganto)**

*(Nagy városokról beszélt a messzi vándor)*

Pri grandaj urboj rakontis la fora vaganto,  
tie la homoj ne konas unu la alian,  
la soldatoj eĉ ne portas pafilojn, sed sur la grandaj  
placoj ili muzikas.  
Multaj kolektiĝas, la infanojn ili tenas alte,  
tiel ili aŭskultas,  
finaŭskultas, poste hejme ili rakontas, kiel bele  
estis, kaj ankaŭ tiuj ĝojas.  
La knabinoj ankaŭ tie priiridas la knabojn, tamen  
ili amas ilin.  
Ankaŭ en hela tago ili amas unu la alian.  
Estas grandaj pontoj, kie eblas longe staradi  
kaj rigardadi la akvon kaj la ŝipojn,  
ili flosadas tien-reen, la pasaĝeroj laŭte  
ekridas,  
ili abrupte eksilentas, kaj tiel ili rigardas la grandan akvon,  
kiam ĝi serioze foriras sub la ondoj,  
kaj tiuj brilas, kiel la klingoj.  
Kaj legeblas la belegaj libroj, tiel granda estas la  
helo, kvankam jam plene vesperiĝis.

## **(La grandajn urbojn)**

*(A nagy városokat)*

La grandajn urbojn mi povas neniel forgesi,  
ankaŭ la fremdulo parolis nur pri ili, nian ĝardenon  
li eĉ ne rimarkis,  
mi eĉ ne scias, kio lin alportis, li ne venis en teatron,  
vanis la invito,  
li eĉ ne rimarkis la najbaran fraŭlinon, kvankam  
ŝin ĉiu admiras,  
ŝi estas blonda kaj alta, kiel turo super la domoj,  
kiam ŝi iras surstrate, al la fenestroj staras, tiel ŝin  
postrigardas eĉ la sinjorinoj, kaj poste ili ĝemetante  
kuiras plu la bongustan vespermanĝon,

silente ili primetas la tablon kaj atendas,  
ni ankoraŭ ne parolis, nur ridetis, tamen mi alsalutas ŝin,  
kiam ni renkontiĝas,  
sed li nur alĵetis rigardon,  
li nur preteriris ŝin, eĉ ne tuŝante la ĉapelon.

Mi eĉ tiam salutus ŝin, se mi vidus grandajn urbojn,  
kie pli belas la fraŭlinoj,  
pli sveltaj ol diablo kaj pli altaj, tie ankaŭ  
la turoj estas pli altaj,  
ili kliniĝadas, se blovas la vento, kaj ruĝiĝante  
ili fikstenas sian jupon,  
mi eĉ tiam salutus ŝin, mi eĉ tiam  
alparolus ŝin,  
kaj pri la grandaj urboj, kiujn ŝi neniam vidis,  
tre bele mi rakontus ankaŭ al ŝi.

## **Junlaboristo**

### *Ifjúmunkás*

Venu, ni iru al via patro, li sidas antaŭ la lampo.  
Li manĝas nigran panon, li verŝas freŝan  
akvon en la glason, ĝi plaŭdadas, kiel  
animo de junaj bestoj,  
tuj ekaŭdos ĝin la najbaroj, ili krucsignos, kliniĝos, levos la  
enorman pendseruron,  
kaj klik-klak – ili fermos siajn pordojn.

Nu, venu jam, la kamenfumo nun pli blue  
flugas al sia hejmo –  
Vere tre amas vin via patro,  
kaj li tre atendas vin –  
Li eliras vespere al la urborando, poste li  
lace hejmen promenas –  
Kun via patrino li maldormas longe –  
Malfermiĝas iliaj pezaj polmoj, nu venu jam –  
Estas jam tempo, ke la pavoj disetendu  
siajn belajn vostojn.

## Laboristo

### *Munkás*

Demetu iom viajn laborilojn,  
lasu libere la koron kun siaj ŝtalfruntaj amikoj,  
multege mi volas rakonti pri viaj forgesitaj  
fratoj, kiuj kovras la radikojn de oldaj arboj,  
kie varme sin kaŝas la serpentoj, kaj ili trinkas el la milda  
lakto de stelaro por poste ekzumi belan, softan kanton,  
eĉ ilia ombrobildo elglitas el la sonĝoj  
de timemaj infanoj –  
ili estas palaj, kaj ili mortos ĝis alvenos la bovino  
de ĉielo kun abunda, varma donaco.

Kaj mi alportis ankaŭ la birdon, ja vi volis,  
mi volas simple voĉi, ja vi volis,  
ĉion, kion mi tuŝis, mi donas en viajn manojn,  
ĉion mi rakontos, ĉion por vi prisilentitan.

## Mi portas mian teron

### *Viszem a földem*

Jen mi, hungaro, tamen eŭropano.  
Mi portas mian teron, ho, Parizo,  
la teron sopirantan vian kison,  
ĉar hejme por ŝi ne ekzistas kiso.

Surflugas korvoj ŝiajn plenajn mamojn,  
en ŝia forta karno talpoj rongas –  
Parizo granda, ankaŭ mia tero  
pri gradancaj, grandaj urboj songas.

La abundgusta koro nigre fluas,  
pro la odoro ebriiĝas ventoj –  
desub la peza, grase dika humo  
parolas tura-urbaj ĝojosentoj.



Se foje ŝi koncipos siajn revojn,  
per sveltaj turoj kantos ŝi sonore –  
Pariz', mi portas mian teron, amu,  
por ŝi mi portos viajn kisojn kore.

### **(Hungario estas fore fore)**

*(Magyarország messzire van)*

Hungario estas fore for.  
Hungario estas trans la montoj.  
Kun kantantaj turdoj de tie ŝi venus  
en mallonga jupeto,  
estus aŭroro  
facilventa,  
hela,  
belaj, puraj ambosoj sonorus.

Sinjoro, ĉu vi ne vidis Hungarion?  
Mi scias, malfacilas ĝia lingvo.  
Mi scias, tre pezas mia koro.  
Sinjoro, ĉu vi ne vidis Hungarion?

Knabinoj multope kuras,  
kiel la frumatena vento,  
iliaj haroj flagras sur la firmamenta  
oriento.  
Kaj ŝi plektas dikan kukon,  
pli sveltas ŝi ol vespera ombro de  
liliodoro.

Sinjoro, ĉu vi ne vidis Hungarion?  
Tie nun aŭtunas,  
en niaj ĝardenetoj  
susurajn, sekajn florojn plantas  
la Sinjoro.

## **Sonorigisto de la laga turo**

*A tavi torony harangozója*

Dece al ŝparemulo  
betofoliojn mi miksis en tabakon,  
tial la pipo  
tre dankemis,  
per raŭkaj voĉoj ĝi min instigis  
postiri  
sian blukoran filon,  
kaj atingante la lagan turon,  
animo de la vesperaj violoj  
en profundo de lago de la virgaj knabetoj  
jam vekadis  
la orharulon:  
Nu, vekigu, vidu, ankaŭ hodiaŭ tiom  
multe ni kreskis,  
jam eĉ la vendisto diris: sinjorido,  
kaj sekvajare jam tutcerte  
longan pantalonon aĉetos por ni  
la patrino.  
Kaj tie  
en turo konstruita al la vantulino,  
spite al la alkoholprohibo  
pendumis sin  
la sonorigisto.

## **Ruĝokula**

*Pirosszemű*

Sub viaj multaj flugiloj vi varmigas mian  
stultetan, pli belan koron.  
Jam defalas la plej ruĝaj pomoj,  
ankaŭ ili repensas pri viaj okuloj.  
Mia ruĝokula birdo, kie vi estas?  
Mi travagadis multe da nigraj teroj por tovi vin.  
Flugu nur, kaj poste revenu! Mi atendas vin,  
kaj multe mi iradas surstrate serĉante

vian ruĝan postsignon en la aero.  
Ŝtonetojn mi ĵetis en la riveron,  
nun ankaŭ ĝi forlasas min.  
Mi vivas inter tiel altaj domoj,  
mi perdiĝus, se ne gardus min  
kelkaj viaj postlasitaj kantoj. Kvankam  
mi ŝatus pli granda ol la domoj,  
vi rimarkus min defore, kiel  
mi kun polmo super la okuloj  
esplorrigardadas tre malĝoje.  
Mia ruĝokula birdo, kie vi estas?  
Mi travagadis multe da belaj teroj.

### **(Vi estas tiel freneza)**

*(Olyan bolond vagy)*

Vi estas tiel freneza,  
vi kuras,  
kiel la matena vento.  
Fine surveturos vin iu aŭto.  
Kvankam mi jam frotpurigis mian tableton,  
kaj nun  
pli klare belas la malforta lumo de mia pano.  
Nu, revenu, se vi volas,  
mi aĉetos kovrilon sur mian ferliton.  
Simplan, grizan kovrilon.  
Ĝi decas  
al mia malriĉo, kaj ankaŭ la Sinjoro  
ĝin tre ŝatas, kaj ankaŭ min  
tre amas la Sinjoro,  
li neniam venas kun granda brilo,  
li ne volas, ke malboniĝu  
miaj okuloj, kiuj  
tre sopiras vidi vin.  
Ili tre bele vin alrigardos,  
mi kisos vin atenteme,  
mi ne deŝiros vian mantelon,  
kaj mi rakontos la multajn ŝercojn,  
ĉar mi multe da ili elcerbumis dume,

por ke ankaŭ vi ĝoju,  
poste vi ruĝiĝos,  
rigardos al la tero, kaj ni ridegos  
laŭte, tiel, ke ĝi transaŭdiĝos al la  
senvortaj, seriozaj taglaboristoj en la  
najbareco,  
kaj en sia laca,  
rompita songo ekridetos ankaŭ ili.

## **Dio**

### *Isten*

Vidis mi, Sinjoro, Viajn montojn,  
kaj tiom malgrandas mi.  
Mi ŝatus esti granda, simila al Vi,  
por povi sidiĝi sur vian sojlon, Sinjoro.  
Mi metus la koron tien,  
sed kiel plaĉus al Vi mia malgranda koro?  
Ĝia malforta balbutado  
perdiĝus en la tondro de Viaj enormaj montoj,  
kaj sub mia lito tranoktas la ĉagreno:  
kial mi ne kapablas multe pli bele?  
Kiel la montoj, kiel la herboj,  
en ilia koro flagras belaj verdaj fajroj,  
kaj la laciĝintaj skaraboj ĉiuj trovas la vojon hejmen, kiam  
vesperiĝas,  
kaj Vi kun malfermitaj polmoj, en ĝisgenue lirla  
kviato,  
tie Vi staras ĉe ilia vojfino –  
Vin mi ne ĝenas, Sinjoro,  
Vi forrigardas super niaj floroj.

## **Piloto**

*Pilóta*

Vi estas belstatura junulo, unu flugon  
pli alta ol la alta birdo.  
Carma metio estas la via, sed ankaŭ la mia.  
En rimena selo vi retrofleksiĝas, vi  
rigardas kiel la tero turniĝas orienten,  
kaj mi per longa balailo purigas la polvajn  
salonojn de la asocio,  
eĉ la anoj ne malfermas nun per forta  
puŝo ĝisangule la pordon,  
ĝi staras aperta, la suno orajn tabulojn  
endonadas tra ĝi,  
troviĝas ankaŭ papero, do mi kliniĝas,  
al mia talio falas la balailtenilo,  
tiel ĝi bavas supren, kaj eĉ poemon mi verkas,  
eĉ ĝin ne pri mi mem, tiom simplas mia vivo.  
Flugu, nur flugu, mi atentos pri vi, ankaŭ la policisto levas sian  
rigoran kapon –  
kun sveltaj stangoj de du turoj ambaŭrande de la pinta kasko –  
kun streĉita kolo kuras la ĉevaloj, la  
laktokanistoj kuntintiĝas,  
inter kvin fingroj la suprenmontrata  
orpomo brilas.  
Vi forflugas.  
La nuboj ĉifiĝas, kiel via peplomo,  
lante ankaŭ vi maljuniĝos, vian longan  
barbon trabilos la sunlumo,  
kaj super via frunto la ĉielo  
subkaviĝas kaj ŝveliĝas denove  
pro la odoro de junulinoj.

## **Forĝisto**

*Kovács*

Forĝisto, forĝisto, bone vi knuspis la ĉemizon,  
poste vi levis viajn du infanojn, kaj vi  
mergis ilin en la fajron.

Nun tie ili ruĝiĝas, kie la juna birdo!  
Kaj kie la multe pli grandaj floroj, kiujn vi  
  devus meti antaŭ vian domon.  
Ankaŭ la suno leviĝas tie, se vi balancas  
  superkape la martelon,  
kaj la amboso  
ektintas, kiel koro de kantantoj.

Tiu vivas sur la plej blua lago, kie ripozas  
  la forĝit-arĝenta animo de fiŝoj,  
vespere venas ĝi pura, blua, ĝi frapetas  
  ĉiujn fenestrojn.  
Forĝu nur, ja vi forĝas belaĵojn!  
Ankaŭ acero kreskas same, kiel vi paŝas grande,  
  fajfas kaj pikas la frunton!  
Vi estas la forĝisto, kaj vi pretforĝas  
  la florojn.

## **(Leono travidebla)**

*(Egy átlátszó oroszlán)*

Leono travidebla vivas inter nigraj muroj,  
en la koro mi portas gladitan veston,  
  kiam mi vin alparolas,  
nepermesate pensi pri vi, mi devas fini la laboron,  
vi dancas,  
mi havas eĉ ne buŝplenon por manĝi,  
  kaj mi longe vivos ankoraŭ,  
jam kvin semajnojn mi ne scias, kio pri vi,  
la tempo forkuris sur sangruĝaj lignokruroj,  
la vojoj kunkaŝiĝas sub la neĝo,  
mi ne scias,  
ĉu eblas vin ami,  
mutaj negroj ŝakludas por viaj delonge  
  forsonintaj vortoj.

*1926*

## **La teamo**

### *A csapat*

Sur la monteto du infanoj altigis turon el  
la bela, mola koto,  
ili kunpuŝis la fruntojn, ili rigardis, inter  
iliaj kapoj longiĝe suprenis la suno,  
lante ĝi ruliĝis sur la arbotrunko tirante  
la teamon tiudirekten –  
Antaŭe la bonkarnaj junuloj ridegante  
levas dupolme herbojn al la ĉielo,  
kaj la knabinoj, la knabinoj – abundaj  
grosroj ruliĝas sur la rondaj mamoj,  
ĉerizo estas en via hararo, vi ĉiuj kuras,  
kaj en la manoj flagras la rubando!  
Vi klinas vin kontraŭ la alta arbo,  
anelante vi atendas la kunulojn,  
kiuj serioze paŝadas post vi, ili  
subrigardas kaj tiel ridetas –  
Vere estas fortaj la viroj, surŝultre bone  
farita pioĉo,  
ĝia pinto moviĝas, kiel pendolo, je  
paŝoj ĝi ritmas, zorge atentas la olduloj,  
kaj dume-dume ili sidiĝas sur la grandaj,  
blankaj ŝtonoj, kiuj silente soras,  
ili flugas lante antaŭen, eĉ surklinante  
sian arĝentan kapon,  
kaj sekvas la freŝaj mortintoj, ankoraŭ  
travideblaj, kiel fenestro,  
dormanta, blanka fiŝo ŝvebas meze de  
ilia trunko –  
post ili jam la pli malnovaj, el sia bela  
korpo ili ĵetas grandajn pecojn sub la arbedojn,  
kaj la skeletaj kun etenditaj brakoj, ruĝaj  
birdoj flugis tiudirekte,  
ili kantas sur la svelta vento, kiu ĵetas  
alten la polvon,  
kiun trabilas falantaj  
kaj freŝe fontaj, grandaj, densaj akvoj.



## **La krabo**

### *A rák*

Ombro de grandaj, arĝentaj fiŝoj flugas  
super la koraloj,  
ili portas al mi vian bruniĝan koloron, sur  
delikataj sablodunoj ĝi ŝvebas for,  
ĝi tuŝas la lacajn snejlojn, kaj tiuj silente ekdormas.  
Mi longe observas ankoraŭ la helon  
travideblan de meduzoj,  
kaj per fortaj tondilbrakoj mi tranĉas  
vojon inter la algoj, tintaj ringoj flugas  
supren en la pura akvo –  
kie pleje glimas,  
venu tien.  
En miaj multaj voladoj kelkfoje  
malsanan steleton mi montras supren al la radioj:  
Ankaŭ vi forte pensu pri mi kaj zorgemu  
en via ĝardeno, kie floras jam la konkoj  
kun aperta ŝelo.  
Mia karapaco malmoliĝas en la drivo de fortaj fluoj,  
ĝian ruĝon pleje komprenas vi –  
Blua florbesto brilas sur mia dorso:  
ĉe la plej blanka ŝtono mi vin atendas...

– Dekuru ondoj rapide de la duno!  
Inter la lozajn, flagrajn petalojn de la florbesto  
grasajn bongustaĵojn trankvile donadas supren  
la krabo.

## **Invitado**

### *Hívogató*

Flugas la turdo, haltas, falas ĝuste lagomeze,  
ĝin atendas plant' aperte kun petaloj kaj senpeze –  
tie kaj ĉi tie tre doloras – plendas ondo kaj  
ebeniĝas sin represe.

Glatas nun jam la surfaco, trankviliĝu  
sur ĝi tremoj de senparaj geamantoj,  
tamen ili nur diradas: Venu tien, alvenu tie,  
ne ridetu, ĉar fontas vento, kaj se vi vin  
superklinos enrigardi, eĉ la lago vin ŝerc-trompos.  
Venu, venu, vi ekvidos, bele forta junulo  
ekpozas sur la bordo antaŭ vi,  
plenspirante sin per bluo la arbuston freŝe  
li transsaltas,  
polmon mergas en la akvon, li aspergas  
ankaŭ sian ŝvelan bruston,  
poste li levas la laborilon, bontintajn  
sonorilojn li forĝas,  
ĉiuj fiŝoj albordiĝas, ili brilas laŭ lia kanto –  
li faros multe da sonoriletoj, kaj manplenon  
da ili alligos li al sia hararo.

## **Alvenis nur la maro**

### *Csak a tenger jött el*

Inter la polusoj de viaj mamoj haltis la blua radio –  
songo de ŝnurdancisto pozas sur ĝi.  
La nubo floris for, por ke vi povu suprenŝvebi,  
kaj mi ja tro multe vin serĉadis,  
kun elspiro de profundaj kaj trankvilaj akvoj flosas jam la mia,  
kaj de mia abio solstara defaladas la bonkarna strobilaro.

Kaj eĉ la plej altaj herboj elkreskis sur la monteto,  
en la koro kun fajro flagranta bele kaj verde,  
tiel la lacaj skaraboj ĉiuj hejmen trovas, se vesperiĝas,  
kaj la Sinjoro  
kun polmoj malfermitaj kaj en ĝisgenua trankvilo  
staras tie, ĉe la fino de ilia vojo.

Sed mi ne estas laciĝinta.  
Alvenis nur la maro ĝis la sojlo.

## **La geamantoj haltis silente**

*A szeretők hallgatva megálltak*

La geamantoj haltis silente,  
ili kaŝis siajn korojn en la lago,  
kaj priparolinte la ondojn,  
ili disiĝis.

Nun vi povas eliri sur la bordon,  
ofertu ruĝan pomon al la arbo,  
multe vi povos kuri, –  
ĉe ĉiu turniĝo el la lago  
al vi fiksiĝos friska vizaĝo.

## **Ŝtalglobo supren, supren! Leviĝu!**

*Acélgömb föl, föl! Emelkedj!*

Solsoleco densigita en ŝtalglobon,  
lante, brile, desur la pinto de kamentubo – leviĝu!

El petaloj de l' alta floro kun vi soras la  
perdita kranio de dio,  
frostinta akvofalo de altebenaĵoj ploregu  
ekiras kontraŭ vi –  
kiu ruliĝos sur ĝi laŭlonge sonigante  
ĝiajn kordojn enormajn?

Solsoleco densigita en ŝtalglobon,  
super la celdirektitaj rostroj de elefantoj  
genuantaj ĉirkaŭe: leviĝu!

Engluiĝis en tuneloj ĉiuj trajnoj fajfantaj belege,  
maljunegaj vaporoj gutadas el stumbliga  
kuŝujo de peĉriveroj,  
furiozaj hundoj tie orientigas la amaran  
aron de malĝojaj kadavroj.

Kiu la pluvon prientenas el kavo de nigra groto,  
por tiu karas la ektondro de orfa ĉielo ĵetanta blindecon –  
ĉiuj fulmoj zigzagas al vi kaj mortas en vi –  
solsoleco densigita en ŝtalglobon,  
leviĝu!

## **(En la diskon leviĝantan mi celĵetas)**

*(A kelo korongba hajtom)*

En la diskon leviĝantan mi celĵetas pint-al-meze  
sur sovaĝ-virbova karno forĝitan lancon  
de la juna virgulino.

Nun vi ekiras por kondukigi hejmen miajn murojn –  
miaj ombroj ŝanĝiĝantaj postrestas ĉi tie  
en la frisko forlasita.

Ĉu vi sensas la ŝtormbloveton incitantan proksimiĝi?  
Antaŭ la urbo manmetita ĝi akriĝas  
kolerete siajn ilojn difektitajn.

Nun vi ekiras trovi novan teron por la semoj,  
tie la branĉoj derompiĝas eĉ ne sub dika infano,  
ĝi glatigas per folioj la ĉifaĵojn de suprenlevita antaŭtuko.

Ĉu la nubojn mi malnodu de miaj genuoj  
en la alto?

Ĉu mi kuŝigu niajn korojn unu sur alian  
sur la ŝtoneroj de l' rivereto?

Vian bruston gardu du montetoj duflanke,  
vian feblan, disvolvitan buŝon savu  
manpleno da netuŝitaj ĉerizoj!

## **Kanteto**

### *Dalocska*

Kiam geamantoj kvereladas,  
ili sinklinante ekaltiĝas,  
kiam geamantoj brakumadas,  
al la tero ili kunglatiĝas.

Ek, do kante –  
haja ha!  
Kaj hurlante –  
hu-hu-hu!  
Ni susuru:  
su-su-su –  
Batu jam la  
dorson, nu!

## **(Nuda bando monte stamfadas)**

*(Pucér csapat dobog...)*

Nuda bando monte stamfadas,  
la ĝardenon tamburkuras  
kaj enridas mian puton,  
maltrankvile ĝi rebluas.

Belaj, fortaj ili karnon  
per frondoj deŝiritaj frapetas –  
saltadu nur alten, saltadu,  
kaj per freŝaj ventoj  
revenu en mian ĝardenon!

## **Ne frapante la pordon**

### *Kopogtatás nélkül*

Se mi ekamos vin, vi povos enveni al mi ne frapante !a pordon,  
sed pripensu bone,  
vi kuŝos sur mia pajlosako, polvon ĝemetas la susura pajlo.

Mi portos en la kruĉo freŝan akvon por vi,  
la ŝuojn, antaŭ via foriro, mi deviŝos,  
ĉi tie neniuj ĝenas nin,  
dorsokline vi trankvile flikos niajn vestojn.

Grande pacas la silento, mi vokos ankaŭ vin,  
vin laciĝintan mi sidigos sur mian solan seĝon,  
en la varmo vi povos demeti kravaton, kolumon,  
kiam vi malsatos, vi ricevos puran paperon kiel teleron,  
se troviĝos io por manĝi,  
sed tiarn lasu iom ankaŭ por mi, ĉar ankaŭ mi ĉiam malsatas.

Se mi ekamos vin, vi povos enveni al mi ne frapante la pordon,  
sed pripensu bone,  
min dolorus, se poste vi evitus min longe.

## **Fortiĝas**

### *Erősödik*

Per mia alrigardo la pomoj ruĝiĝas kaj rindiĝas,  
en forta, ĝisgenua tritiko kuŝruliĝas la knaboj-knabinoj.  
Mi sidas sur branĉo de la alta arbo, pendas la piedparo,  
iliaj ridoj krispigas miajn buklojn.

Ja ne scias la knabinoj, kiom  
mi ŝatas ilin.  
Tiam kure ili alvenus, multcent-ope  
ili kolektiĝus ĉi tie ĉirkaŭ mi,  
kaj la verdajn foliojn mi dumane ĵetadus  
sur ilian hararon,

tamen antaŭe ĉiujn harojn duflanke  
mi kiskus rapide.  
Sub mi fortiĝas la ĉielo, fortiĝas ankaŭ mi  
en la mondo,  
sur la dorso de sia multkorna cervo alvenos foje la  
nuda junulino.  
Tiam ŝi ekis, kiam la okulojn mi malfermis  
al la patrino,  
jam antaŭ dudek unu jaroj,  
ke ŝi forlasis la arbaron por mi.

**(Mi malsanas)**  
*(Beteg vagyok)*

Mi malsanas sen vidi iun dum tri tagoj,  
la najbarino laktokruĉon starigis  
sur la tablon,  
mi ne rajtas morti, malpermesate ĝis ne  
akiri la purecon,  
mi ne scias ankoraŭ, kia ĝi povas esti, mi ŝatus, se ĝi havus  
multe da  
kapharoj, mi ŝatis ĉiam la abundan kararon,  
mi plugus ĝin per fingroj, sed tre-tre atenteme,  
mi fine perdiĝus en ĝi, kaj sobriĝinte pro ĝia bonodoro  
mi ekdormus tie.

Jes, etulino, foje ankaŭ ni ĝojos.

Ĉar mia elspiro helpas la nubojn, kaj eta maljunulo  
longe bavas post la aro malapera,  
singarde poste li ekiras dume eĉ la pipo  
estingiĝas.  
Iĝas malvarmete,  
la juna servistino, ĵetita surstraten, vekadas la kadavron  
de sia fileto.

**(Mortis panjo)**  
*(Anyám meghalt)*

Mortis panjo, nun mi ne scias, kiel  
    kondukti al ŝi,  
ŝi flikus mian jakon, ŝi rigardus, kiel bela  
    mi estas nude,  
ankoraŭ neniŭ min vidis nudi!  
La kampuloj finis rikoltojn, sur etaj benkoj ili  
atendas la morton –  
cimoj mordas niajn songojn, niaj teleroj taŭgas  
nur por ornami murojn,  
nur iom da butero donu al mia pano.  
Sed ni volas pli bonan tagmanĝon,  
kaj ni iĝos pli bonaj,  
pli da ŝuoj, kaj ni estos pli multaj.  
La ponto lante elvenas el la nebulo, transaborde  
    staras bajonetoj –  
Jen la tondilo, tie la teksenda teksaĵo –  
    pri kio ni atendas?

**Mi prenos ŝin**  
*Mégis elveszem*

Mi promenadas lante hejmen,  
arme' venkita kuras hejmen –  
Neniam havis min edzino.  
Sed nun atendis min edzino.

Alvene ŝi okule diras,  
forkure ŝi sonore diras:  
karesu min, ho, kara edzo,  
min fajre batu, edzo.

Sursojle mi iome haltos, –  
sur ŝia alta kor' mi haltos. –  
Al mi ŝi sternas siajn kisojn,  
ĉielen semas kisojn.



Subŝvebas al ŝi kaŝbaro.  
Subŝvebas al ŝi flamarbaro.  
Tiel ŝi prenas min triumfe.  
Tamen mi prenas ŝin triumfe!

## **Kirasa trajno**

### *Páncélvonat*

Ekbrulis l' aviadilo sub la mondo.  
La sonora insulo  
nekredeble forflosis.  
Kaj du junaj geamantoj  
daŭre pluserĉadas  
la feliĉon.  
Ĉiujn hastojn al la peste bela futuro –  
kial malfruas la fer-odora,  
kvankam mi tiom ĝin atendas!  
La amasigitaj domoj genuiĝas,  
nur la plej svelta turo obstinadas,  
ĝi ne faligas lace sian sonorilegon,  
sed ne fieras plu pri sia urbo.

El forgesita, trista tunelo  
muĝante elkuregas la kirasa trajno,  
kun lumŝargitaj kanonoj –  
miaj multaj, belaj, prodigitaj fortoj.  
Kiel la plej granda,  
sopiriga amo  
mi estas egoisma, senindulga  
kaj forta.

## **La ĉiela kirastrajno**

*A mennyei páncélvonat*

Nokte,  
kiam la lacaj soldatoj gardostaras antaŭ la  
pordego konstruata,  
la plej turmentita obtuze falas teren,  
lia koro elkurigas siajn relojn,  
kaj el la vertiĝa stacidomo de la lumoj  
elkuregas la ĉiela kirastrajno.

La kirasa trajno ektondras kolere,  
sed nur la pavoj aŭdas ĝin, kaj ili disetendas  
sian voston devige  
kaj en sangon de gejunuloj flufalas  
el ĝiaj kanonoj la amo.

Ĉar lukti necesas eĉ en la morto;  
la laca vivo ne eltenas ĉiujn batalojn –  
kiam mi estis freŝa vivanto,  
kial ne tiam vi elbruis el mia koro,  
bonbatala, ĉiela, kirasa trajno!

## **Min la mondo se forpelos**

*A világ ha elbujdosztat*

Min la mondo se forpelos,  
tamen vokos sonorigi.  
Tamen la sonorigisto  
nur revenos sonorigi.

La revenon li bedaŭros  
adiaŭi sonorege,  
Domo fajras, kaj li venos  
nove helpi sonorege.

Poste foje dum la festo  
oni serĉos lin je morto,  
li revenos sonorigi,  
sonorigi jam je morto.

## **Glaso**

### *Pohár*

La glaso estas freŝa planto,  
brilanta surkampe, kaj la rosgutoj ĝin surflugas.  
Se etulo glasojn alrigardas,  
ili milde  
ektintas.

En la koro de fontoj kreskas glaso,  
sed la vitristoj ne konas tiun sekreton.  
La knabinoj kaj la junuloj  
ĉiam intermiksas siajn glasojn.

Miksis ĝin foje ankaŭ mi,  
de tiam por mi mankas glaso kun akvo bongusta,  
kvankam la soifmortanta birdo  
rimarkas la multajn, belajn glasojn malantaŭ la ĉielo.

## **Floroj**

### *Virágos*

Sub florarboj mi promenas,  
al edzino mi promenas,  
dise kreskas jam somero,  
la edzino: jen somero.

Ŝi kun lumoj sur la sojlo,  
miakore ŝi sur sojlo,  
kun serioza ĝoj' ŝi kantas,  
al la edzo ŝi ĝojkantas.

"Mi kreskigis ŝtonon roje –  
ne kaŝkuru vi jam roje –  
ĉiutage plaŭdis akvo,  
puras ŝton' jam kiel akvo.

Vin mi serĉis, vin mi trovis  
por la turo vin mi trovis,  
vin mi loĝos, ho, Sinjoro,  
venu hejmen, ho, Sinjoro."

Voku, kara, kaj mi iros,  
flage kun muzik' mi iros,  
ĝis post ĝojo larmoj venos,  
ankaŭ edzo hejmen venos.

## **Muĝu turo**

### *Bōdülj torony*

Glavpinte giras mondo.  
Milito – mia kredo.  
Kun belaj por la grandaj –  
plej bonas la batalo!

Mi fermas la okulojn:  
kiu min batos kaŝe?  
Mi ridas vastabuŝe:  
kiu enpuŝos ranon?

Blindulo ŝerca: mondo.  
Bastono – mi, enmane.  
Mi floras terpikite:  
do, min ĝi enfajrigas.

Ekmuĝu, turo, kuru!  
Elĉerpu fortojn, kuru!  
Kun belaj por la grandaj –  
tamen vi ja revenos.

## **Mi koleras por vi, ne kontraŭ vi**

*Érted haragszom, nem ellened*

Kiam la suno leviĝas,  
forŝvebas la roso desur la haroj de la neniam-kolerantaj,  
mia kolero neniam ofendu vin, kara.

Multe mi pensas pri vastaj, kuraj placoj, kie eble mi devos foje  
fali,  
venos tien kun mastoj la mastofaristoj en ŝtopitaj vicoj,  
kaj venkinte tie, ses milionoj da feristoj ĵetados siajn  
tintasonajn  
martelojn al la altoj.

Vi eĉ ne rimarkas, ke mi talie rektiĝas, kiam mi parolas pri la  
estonto,  
se vi volas, do nur post tiu urbokanta venko mi revenos al vi,  
aŭ la panfaristoj kunligos siajn panĵetajn, bonajn ŝovelilojn,  
kuŝigos min laŭlonge sur ilin kaj kun klinitaj farunkovritaj  
kapoj  
ili portos min lante al via lito.

Mi koleras por vi, ne kontraŭ vi,  
jen nu premu mian manon, per kiu mi alten tenas vin ensonge,  
forigu vin mia kolero, neniel eĉ iom ofendu, kara.

## **Havos siajn florojn**

*Jut most elég virág*

Fortu mem, kaj fortos ja via afero,  
estas mi mem por mi trista la afero.  
Falĉis mi, kaj oni portis min militi:  
iru kun falĉilo, iru tuj militi!

Fortas koro, sed malsatas mi ĉifona,  
ŝatus esti ne malsata mi ĉifona.  
Naŭza kadavraĉo mi preferus esti,  
sortodirektanto mi jam volas esti.

Tombo de mortintoj florkovriĝas bele,  
tombo de mortintoj ja kaviĝas bele.  
Kiu venkos, plie altos ties floroj,  
al amant' libera venos ties floroj.

Havos siajn florojn ĉiuj liberuloj,  
tio plaĉos al subtilaj liberuloj.  
Plaĉu: por mi lukto estas la destino,  
venko post la lukto estas la destino.

## **Ribelo de geamantoj**

### *Szeretők lázadása*

Alvenos tiu nokto, kies  
stelaro ĝis la koroj brulos.  
Kun flagraj haroj, melodioj  
ribelaj geamantoj kuros.

Kantante al la bordo portos  
ĉiu la karan, ruĝan pezon.  
Apertos vaste muĝa maro  
kaj ili ĵetos ĉion en la mezon.

– Vi venkis, ni reportis amon,  
la gustojn ni reportis, ploron,  
katenojn niajn nun reprenu,  
bandaĝu vian kordoloron.

Jen, prenu niajn ĉaptintilojn  
pajacajn, kronon de l' esperoj,  
saketon da faruno, tristan,  
gluan manplenon da vinberoj.

Akceptu ĵus-ŝiritajn frondojn,  
telerojn, balailon, korbon,  
la lertajn laborilojn, sed ne  
la liton – prenu nian korpon.

Kun fulgaj, braĝaj fruntoj ĉiuj  
knabinoj, knaboj kaŭras tremaj,  
vibrante al ili subŝvebas  
enorme grandaj lunoj plenaj.

La akvo pro l' donacoj multaj  
elvenas, ilin kovras trene,  
tamen ĝi muĝas vane, tio  
fortigas la kantantojn ene.

Knabinoj kantas: Jen ni, maro,  
amara sal' vi estas en ni, –  
kaj knaboj kantas: Jen ni, bordoj,  
amara mar' vi estas en ni.

Kaj sur harnodo nun la maro  
brilajn mortintojn lulas tinte,  
kolere, triste ĝi memoras  
pri l' amo jam silentiĝinte.

## **(Ho, pretaj sibli kaj konsili)** *(Mindig jótanácsot sziszegnek)*

Ho, pretaj sibli kaj konsili,  
stultulojn junajn trovas ili,  
la gardemuloj kaj kalvuloj,  
dikventraj, ruzaj fisaĝuloj.

Se mia brusto vaste muĝas,  
pri l' amo ili leĝe juĝas.  
Per mono – dum ili moralas –  
la belulinojn akaparas.

Kuregu, ili admonadas,  
la podagruloj, nur nin gvatas.  
Montrante multajn fuŝmedalojn,  
ili papagas triumfarojn.

Suĉ-dio en la kripokesto,  
vin naskis miakore pesto,  
eternas via infanesko,  
jam estas tempo por plenkresko!

Ĉe forno sidis ni neniam,  
necese: hejtu ankaŭ ni jam!  
Ni rostos ĉiujn la saĝulojn,  
kaj plej-plej urĝe: la kalvulojn.

## **Formiko**

### *Hangya*

Formiko endormiĝis inter pupoj.  
Vento, nun la pupojn ne forblovu!  
Cetere tutegale.

Formiko metis kapon sur briletojn,  
ankaŭ la ombreto dormas pale.

Ĝin bele-milde vekis per pajlero!  
Sed prefere tuj ekiris hejmen,  
la nuboj tre ekaris –

Formiko endormiĝis inter pupoj,  
jen – pluvero sur la manon falis.

## **Viaj haroj miafingre**

### *Hajad az ujjamé*

Viaj haroj miafingre, sub via jupo  
sin kaŝas gape mia koro,  
kaj susure defalas folioj de l' kalendaro.

Mia sojlo ploras, kiel infaneto,  
kiam vi venas, ke venu pli ofte.



En forta aro la malnovaj tagoj  
spirhalte maĉas al mi la orelojn –  
nin kial vi ne kisis en ŝin?

Kaj ne komprenas ili palaj, stultaj,  
ke ili ne brilas konvene al viaj okuloj!

## **Sidi, stari, murdi, morti**

*Ŭlni, állni, ôlni, halni*

Tiun seĝon flanken puŝi,  
por la trajno jen alkuŝi,  
montgrimpane time muti,  
sakon al la valo ŝuti,  
araneon incitadi,  
oldulinon amorflati,  
bongustan fabsupon vori,  
vojon tra la kot' esplori,  
ĉapon sur la kapon meti,  
lagorande promeneti,  
lagofunde silueti,  
inter tintaj ondoj beli,  
inter sunfloroj prosperi –  
aŭ nur bele ĝemdiskreti,  
nur muŝeton forhuŝeti,  
mian polvan libron viŝi –  
mian spegulon surkraĉi,  
kun malamikoj paciĝi,  
ilin ĉiujn ekstermaĉi,  
gapi sangon ekgutantan,  
vidi injon dance vantan –  
aŭ nur pace vivprodigi –  
Budapeŝton ekbruligi,  
per panero birdon peti,  
la panaĉon teren treti,  
amatinon ekplorigi,  
la fratinon surbrakigi,  
kaj se saldi pri la mondo,  
ĝin forlasi sen respondo –

Ho, vi liga kaj malliga,  
ĉi-poemon finverkiga,  
ridgajiga, ploropika,  
vivo mia, vi, elektiga!

## **Ili ekdancas**

### *Táncba fognak*

Kaŝitajn argumentojn kiu  
kapablas proprakape venki!...  
Nun mi ekŝipas kaj foriras,  
kaj oni eble eĉ rimarkos:  
vanis kuiri la tagmanĝon,  
kaj vane ili min ordonas,  
el kelo mi ne portos karbon.  
La policano meditados,  
se estos stela vesperego,  
kaj ne vagados strate iu.  
Tre sentos ankaŭ la knabinoj,  
ke bavas malpli da okuloj  
al akve klinaj kanokruroj,  
sed ili ekridetos nove,  
ili ekdancos ĉiuj-ĉiuj,  
kaj gaje-ĝoje ili kantos:

li amegis tiom  
la karulinon,  
ŝipis li, kaj ŝipo  
dronis en ŝlimon.

## **Kvaropo plonĝis**

### *Négyen ugrottunk vízbe*

Kvaropo plonĝis en akvon. Ŝaŭmoj  
verŝiĝas, muĝas en la koro, flagras  
iliaj krestoj, kiel flamaj flagoj.  
Miaj amikoj, belajn, purajn, friskajn  
flamegojn kirlis ni el la trankvilaj

akvoj marŝantaj kun deziroj, kantoj  
sub di-metitaj turoj de montegoj.  
Tero-patrinon, la benatan, kiu  
alia portus al fortkoncipa, pura  
nupto en siaj brakoj, korpo, koro?  
Kiu repremus la nubigajn larmojn,  
malĝojajn ĝemojn de la orfaj plendoj,  
por ke dolora ŝvelu en la koro  
ĉio estanta dio-landa, brava,  
hom-fida ago ĉe la diamanta  
turniĝo-punkto de pordegoj novaj?  
Kiu do, restus forta, serioza?  
Tamen ni restu tre-tre fortaj, kiam  
venos parenco plej interne ena  
de pluvoj, tero, akvo de pureco,  
super memoro nia ne aŭdiĝu  
trista deklaro de kritiko vera:  
Englutis teroj kun vizaĝ' senforma,  
reportis akvoj tiujn, kiuj  
la fortojn: teron en siaj muskoloj,  
la kirliĝantan akvon en la koroj  
rifuzis time en epok' malbrava.

## **Du floretojn**

*Jut az ember*

Du floretojn oni prenas,  
unun sur la ĉapo tenas,  
la alian li prodigas,  
ilin ambaŭ li velkigas.

Li malĝojas, ponton pasas,  
voĉas akvo – vin mi lasas –  
sed li ion teni ĉesas,  
kaj li poste ĝin forgesas.

Vesperigās - li tremridas,  
ondoŝaŭmoj pli rapidas,  
kap-sur-brake li ekdormas,  
sed la nokto vene mornas.

## Tintilo

*Csengő*

La faradon de tintiloj  
inventi nur tiu povis,  
kiu la okulojn karajn  
forgesi neniam povis.

Sur la arboj eksonoras la tintiloj:  
iu alvenis.  
Ankaŭ la frumateno havas multe da tintiloj,  
la frumateno  
el la koro de junedzinoj estiĝis.

Kolera knabino  
foje ĵetis sian tintilon en arbuston,  
ŝi nun pale atentas eksonon de l' perdita  
tintilo,  
Kaj riĉa sinjoro  
tintilon pendigis sur kolon de servisto.

La tintilsonoro  
foje ŝvebas tra la sonĝo de servisto.  
Se ne estus tintiloj, tiam mi mem  
eltrovus ilin.

## Pluvas

*Esik*

1  
Pluvas, pluvas –  
la polvo malseke tremetas survive –

Klakas, tondras –  
frapado – aŭskultu – sur koro aldrive –

Nudakorpe  
kuri, kuri  
disbrake kuri al arbaro –

pluvas, pluvas –  
polmon kial  
vi tenas sub la fulmofalo? –

Vento portis –  
vento

el libera hararo de knabinoj  
laŭt-ridaj falante ĝi ŝvebas –

malĝust-koraj sekaj folioj  
sur branĉoj krakante ekveas.

2

Mi volas ankaŭ vian jup-odoron,  
vi batas, kisas min, nur ne atendas –  
kiel puriĝu mia amo iam,  
se voĉe, poze vi min daŭre tentas –  
doloras, vidu, frunt' pro kolizio,  
doloras tre, ke pasos ĉi-doloro,  
mi vane ŝiras ĝin kun tordokuloj,  
ĝi ne saniĝas, sed nur plu-plu ŝiriĝas –

vi ĉagreniĝas vane,  
nubo elspira de veruloj  
ne helpas pri via doloro –  
per mia koro devas vi elplori ĉion,  
ke ne pereu por vi mia koro!

3

Ĉe di-piedoj ni eksidos kune,  
kaj vi malligos viajn tintajn mamojn,  
li mem ekpalos, flegme mi rigardos,  
ke du animoj apud mi malfortas,  
ke miakore vi du serĉis vin du,  
kiuj en mia lito vin renkontis –

sed mi mencias dion kaj la flegmon  
nur tial, ĉar laŭtplore mi putriĝas.

4

Falegu pluvo, kovru tutan mondon,  
ĉar per tiaj virinoj ĝi sin punas,  
kiu ĝin gardus, tiun mi mortpikos,  
la historio se tion postulas.  
Kvankam mi fias por futuro granda,  
tamen mi luktos ĉe la barikadoj –  
la geamantoj novaj, flavaj, blankaj  
ne vidu min, senfortan suferanton.

Ili renkontu sin sur mia korpo  
ekde Pekino tute ĝis Londono,  
ili ridetu nur pro ĉi-poemo  
pri la suferoj de ĉi-fiepoko.  
Al vi libero, iras mi renkonte,  
al vi faladas larmoj de fratino,  
ĉiuj suferas ni kaj meritas  
ekĝui kelkajn tagojn de senlimo!

## **Socialistoj**

### *Szocialisták*

Doloro, mizero kaj bono nin kunarigis,  
ni vadas en forta tritiko, la kara armilo  
pikadas al ni la gluteon –  
ho, kara armilo, pikadu nur nian gluteon  
senĉese,  
por ke ni eksciu denove, denove – ke venki  
ne eblas hazarde.

Ne urĝe, ni fortas, ni scias, kiun, kial ni vokos  
antaŭ tribunalon.  
Ni staros konsilion surmonte, feblaj  
koturnoj, leporoj ĉepiede trankvile sin kaŝos –  
foriros desuper ni la nubego, por ke ni rimarku  
ĉiujn fremdajn aviadilojn.

Vi iros suden, mi okcidenten, kaj vi norden,  
kamarado!

## Oni min entombigas

*Engem temetnek*

Ridetas pastro kaj serenoplene  
adoras dion de senzorga graco,  
zumadas vespoj sur la polva vojo,  
min funebrantoj sekvas al finpaco.

Jen, ektiminte bruna knabineto  
al la fenestro premas la nazeton,  
kaj ŝia paĉjo per la pipotubo  
milde frapetas al ŝi la pugeton.

Rosantaj herboj kun malakraj gustoj.  
Ĉie sur arboj ruĝa frumateno.  
Susuras frondoj, saltas la lokustoj.  
Sian spinaĵon flikas araneo.

Mia memoro pli kaj pli rigidas.  
Kaŝpolicano pikas sian frunton,  
ĝis mia tombo venas, ne plu eblas  
inciti al li mian bonan hundon.

## La ĝardeno

*A kert*

Ekpensis novan tremon la ĝardeno,  
konvenan al ĝi kaj kanteblan,  
ĝi sciis min, sinveste jam atendis,  
kaj mi ne konis ĝian koron febran –

Plej belajn arbojn sendis ĝi sur monton  
por muĝi, mia frunto se suprenas,  
sinkline ili lavas la radikojn,  
ili val-voje min akcepti venas –

Sur vala vojo venos mi ĉielen,  
sed tiun monton ĉiam mi kunportos,  
min povus murdi plago elektita,  
tiu ĝarden' kun mia koro mortos –

## **Begle mi skribos**

### *Kirakom röggel*

Mi estas amanta amate,  
blonda donaco, kalva uzuro,  
tintantaj ondoj, obtuza polvo,  
verse ne ŝvebu polva malpuro.

Post la segulon mi metas baston,  
begle mi skribas: viv-morti bonas,  
kaj kiun Luca arbare lasis,  
tiun vespoj, turdoj somnolas.

Kaj nun mi serĉas mian aceron,  
derompas branĉon mi por bastono,  
tri florojn batas mi dehakante,  
ili odoru sur mia zono.

## **Inter mirantaj skaraboj**

### *Csodálkozó bogarak közt*

Inter mirantaj skaraboj mi paŝadas kuraĝe,  
se mi estus nuboj, nur en seksezono mi venus ĉi tien,  
mi evitus ekskursantojn, ili kolektas la paperojn,  
ĉar eble pluvos sekvajare,  
desub la eluzita vesto ilia varmega korpo  
replikas kun la somero rajdanta,  
semajnlonge ili ludadas kaj sur kaŝfrondo  
forgesema birdo atentis  
pri ilia ĝojo.

Laŭ la paŝoj bonodoraj de knabinoj kaŝaperis  
tiu senkulpa ŝtonero,  
tiu ŝtonero ne estas Attila József, nek la herboj,  
nek mi estas li,  
mi estas amiko de ĉio ĉi tie, en mia polmo  
dankeme rompiĝas la nuksoj,



el mia hararo la enmiksitan pajleron  
atenteme eltiras la branĉo –  
kampo, kampo kuriganta, kvazaŭ mia karulino  
kun fruktemaj brakoj,  
kun jupo de konverta svingiĝo iras pinte  
antaŭ la junuloj,  
ĉiujn viajn odorojn vi donis al ŝi, do nun ni floru sen ĝi,  
vi multegaj,  
alĉiele turnitaj ŝildoj.

## **Kulturo**

### *Kultura*

Laciĝis la floro odori.  
Ĝin tedis,  
kial diable ni ĝin sur tablon metis.  
Ĝi strebis ĵeti ombron,  
pli grandan ol en la ĝardeno,  
kaj ĝi laciĝis, kiam ni ne priatentis.

Sed mi rimarkis.

## **Oni min entombigas**

### *Engem temetnek*

La pastro ridas kaj serenoplene  
adoras dion de senzorga graco,  
zumadas vespoj sur la polva vojo,  
min funebrantoj sekvas al finpaco.

Jen, ektiminte bruna knabineto  
al la fenestro premas la nazeton,  
kaj ŝia paĉjo per la pipotubo  
milde frapetas al ŝi la pugeton.

Rosantaj herboj kun malakraj gustoj.  
Ĉie sur arboj ruĝa frumateno.

Susuras frondoj, saltas la lokustoj.  
Sian spinaĵon flikas araneo.

Mia memoro pli kaj pli rigidas.  
Kaŝpolicano pikas sian frunton,  
ĝis mia tombo venas, ne plu eblas  
inciti al li mian bonan hundon.

## **Alvenigo de la leono**

*Az orozlán idézése*

Cigaro interdentis,  
artikon klingo plugis,  
min banis ŝaŭma ŝtormo,  
enbuŝen muŝo flugis,  
inaĉo kun mi dormis,  
la sonĝo al ŝi plaĉis.  
Sangon tuis mi timige,  
sed neĝen mi ne kraĉis.  
Tirboje mi fidrivas,  
aŭdu ridi ni mortinton,  
mortinto eble vivas!  
Kaj mi trinkis vinpokalon,  
maĉis mi porkid-skapolon,  
mi manpremis al mi manon,  
mi klakigis okuldentojn,  
miajn diojn mi forvendas,  
eĉ la vesto sur mi fremdas,  
vane serĉus min fiulo,  
ĉar kun koro adoleska  
kaj kun amo post spegulo  
leonon mi atendas –  
Ĝia densa kolhararo  
miajn ŝuojn brilaj ciru,  
poste ĝi min karesadu,  
mian gorgon ĝi ungŝiru,  
fermokule min traleku,  
fine mian litobarkon  
senpariĝe kaj hurlante  
gardu mian katafalkon.

## **Patrino en vestlavado**

– **Funebrokrono** –

*Anyám a mosásban*

– *Gyászkoszorú* –

Mortis panjo, nun mi ne scias, kion fari pri ŝi,  
ŝi tenis la tason dumane,  
iudimanĉe, tiel vespervene, ŝi silente ekridetis,  
de kiu ŝi ricevis floron, tiu ne havis noton en matrikulo,  
la ekstrakton eĉ la dommajstro ne vidis.  
Se ŝi vivus en Ĉinio, oni sendus ŝin al la drakoj,  
sed ŝi ekaltiĝas,  
la drako loĝas malproksime, mi hejmen kuros  
por mia rizeto,  
ankaŭ mian funebrokranon mi plektos anstataŭ vi.

Ŝi flikus mian mantelon, ŝi rigardus, kiel  
belas mi nuda,  
ankoraŭ neniam neniu vidis min nudi,  
en la vestlavado ŝi kurbiĝis iomete,  
kaj mi ne sciis, ke ŝi junas,  
ensongĉe ŝi surhavis puran antaŭtukon,  
la leterportisto ŝin salutis tiam.

*1927*

## **Proletkanto**

### *Proletárdal*

Flosas ĉiu kontinento  
friskaakve en silento  
parapamm paramm papamm  
friskaakve en silento.

Per terpomoj, kun kulero  
vivas mortas ni sur tero  
parapamm paramm papamm  
vivas mortas ni sur tero.

Ho, etulo, kial plori?  
mi ĉemizon revas por vi  
parapamm paramm papamm  
mi ĉemizon revas por vi.

Ĉia morto venas per tio,  
se vin gardas nur Partio  
parapamm paramm papamm  
se vin gardas nur Partio.

## **Maldeca kanto**

### *Szabados dal*

Mankas lampo? Ne tro drame,  
brulu burĝo kandelflame!  
Se fabaĵo vin jam flustras,  
burĝ-fumaĵo bone gustas,  
ĝuste tiel, dolĉa kompano!

Pri frotvundoj ne tro miru,  
burĝograse ilin ŝmiru;  
ĉu fenestro? ĝin mastiku,  
burĝajn nazojn tuj plenigu,  
ĝuste tiel, dolĉa kompano!

Se batali nur mallaŭte,  
bindu Markson burĝohaŭte,  
se ne Markson, Bakuninon,  
aŭ prefere Kropotkinon,  
ĝuste tiel, dolĉa kompano!

Ju pli multe, des pli bone,  
skurĝu burĝojn nur impone,  
vi, timema, ne plendumu,  
nur cent dudek vi pendumu,  
ĝuste tiel, dolĉa kompano!

## **Enkonduko**

### *Bevezetö*

La fratet' de onjo Ljdi,  
la parenc' de Batu-hano,  
pri peplomo sen avidi  
Peŝte vivis li per pano;  
la meriton de l' poeto  
fabkuire morto festas,  
hej, vi burĝo, hej, proleto,  
mi, Attila József, ĉeestas.

## **Ho Vi, Eŭropo...**

*Ó Európa...*

Ho Vi, Eŭropo – lim-amaso,  
post ĉiuj limoj murdistaroj –  
mi ne funebru pri knabino  
naskonta idojn post du jaroj.

Ho, ne permesu al mi honti,  
ke mi naskiĝis Eŭropano,  
ke frato de liberaj ursoj,  
mi malliberu en malamo –

Poemas mi por vin amuzi,  
montpinton suprenvenis maro,  
kaj primetita tablo flosas  
suronde meze de nubaro –

## **Andor Németh**

*Németh Andor*

Iun tre-tre puran akvoguton  
ŝmiru sur liajn okulojn blue,  
lin atendas duĝiba kamelo  
tridek ses jarojn jam surgenue.

Lidi, kuiru por li buljonon,  
rabeno, diru por li kabalon,  
por ke li havu propran popolon  
aĉetu por li kvakan ranaron.

Kanontondre, sovaĝe trakuris  
lian perlamoto-aĝon maro,  
liaj du bukloj konservis grizan  
ĝemeton de l' buĉita fiŝaro.

## **Kanto en Kiszombor**

### *Kiszombori dal*

Vi kaŭzis tiom da konfuzoj – pli kare  
vi alrilatas mian amikon ol min.  
Mi ŝatus karesi nur vian hararon.  
Apenaŭas mia tuŝo.  
Fremdaj sentoj min ofendas.  
Akvogute  
vi lumas en miaj revoj.  
Mi hojis, nur hojis ĉiutage.  
Mia pado erarvadis  
inter viajn buklojn malĝojigajn.  
Sinjoro Sándor estas eleganta-ganta,  
kaj miajn manojn vi ne varmigas.  
Drinkadas – hej! – la junuloj,  
estas festo,  
kaj mi ne povas ĝoji pri vi.

## **Mi benas vin per tristo kaj gajo**

### *Áldalak búval, vigalommal*

Mi benas vin per tristo, gajo,  
mi vartas vin per kora majo,  
mi gardas vin per polmaj petoj,  
per tritikejoj kaj nubetoj.

Vi dancas en detru' muzika,  
mia savmuro: fal' kronika,  
en ruin-ombroj min mi lulas,  
en via spiro mi nebulas.

Egale, ĉu vi amon sentas,  
aŭ kun mi vi ne koridentas,  
sed vin mi vidas, aŭdas, kantas,  
al dio nur vin mi respondas.



Arbaro streĉas sin matene  
kun mil-mil branĉoj brakumeme,  
la lumojn deĉiele ŝiras,  
sopire ilin koren tiras.

## **Pariza bildkarto**

### *Parizsi anzix*

Neniam vekas min patrol' matene.  
Jeanette-oj oni nomas servistinojn,  
aĉeti ĉe frizisto eblas plene  
kandelojn brulajn, lamajn trambulinojn.

Saint Michele: tra ĝi nudulinoj svarmas  
sesdek ses, ili kantas al ĉielo;  
Notre Dame: en ĝi vintre-tre malvarmas,  
desupre montras min la belvidejo.

La turo Eiffel nokte flanken glisas  
sub la peplomon de nebulo-feloj,  
la policanoj belulinojn kisas,  
kaj mankas la sidrand' en necesejoj.

*1928*

## Du poemoj

### *Két vers*

– + en tuberkulozo –  
– + *tbc-ben* –

Mi priploris funebradon,  
mian laman kamaradon.

Bonaj kisoj lin ne trafis.  
Lukte ŝuojn li riparis.

Li laboris, li silentis,  
stamfis li, se ĝojon sentis –

Ne plu flikos ŝuojn li jam,  
eĉ trovinte amon sian.

Li batalis kor-anime,  
li meritis salvon fine.

La tri forĝistoj  
*A három kovács*

La tri timigaj forĝistoj  
haltas ĉe la tombobordo –

Unu blovile fajrigas,  
por ke ne frostigu morto.

La alia el rad-ringo  
aŭreolon fajran faras –

kaj la tria, jen en jupo,  
ardan bebon marteladas.

## **Attila József**

### *József Attila*

Gajis, bonis, sed obstine  
nepran pravon li akiris.  
Li tre ŝatis manĝi, fine  
iom dion li similis.

Kuracisto juda donis  
la mantelon, ĉar lin nomis  
la parencoj: "Nepluvenu".  
Ankaŭ en la religio  
estis popo nur, ne pio –  
mondan havis li doloron,

nu, sed lasu la angoron.

## **Svingajupe**

### *Pöttyös*

La flamo buŝe kun burĝono  
kapreola-paŝe aperas.  
La sorĉaj dentoj mian pipon  
amaran elfaligi devas.

Doloroj junaj turmentadas  
herbaron jam-jam maljunaĝan.  
Nun rememori: kiam vidis  
ĝi virgulinon brizo-paŝan!

Herbaro iĝos mi vespere,  
kurbigos min purpuraj rosoj,  
vi la sopirojn povos danci  
sur miaj paciencaj sprosoj.

Sed vi forkuros svingajupe,  
se vi ekvidos min flagrantan,  
mi devos tine akvon verŝi  
sur la herbaron ekfajrantan.

## Lagolule

### *Tószunnyadó*

Lagolule en intimo,  
ekpacante al senlimo  
savu amon, kiu donis,  
kiespolme ĝi burĝonis.

Zorgetoj miaj forpasas,  
mi poŝtranĉilon forlasas –  
kun kria floro vi tremas,  
silentbranĉe ĝi serenas.

Vi voĉas sense ondadon,  
ĝi voĉas mense tondradon.  
Ĝi amas min tre adore,  
eĉ vin ĝi toleras kore.

## Luca

### *Luca*

En fianĉinperdo  
la amo kreskas morne,  
kuras vaka vento  
mian koron forŝtorme.  
Semajnojn mi mutas.  
Kial vi amon donas –  
al di' mi balbutas –,  
se la amo malbonas?

Kiel la animon  
regas ĝi – jam blasfemo.  
Ĝi belon, intimon  
puŝas al la perejo.  
Birdaron ĝi buĉas,  
pacan valon neĝkornas,  
kastradon ĝi ruĝas,  
funebradon konformas.

Morti mi ne povos  
ĝis mi ne altrovos  
ĝian arbitron eternan  
per mia vivo eterna.

**(Mi estis por ŝi)**  
*(Csüngöje voltam)*

Mi estis por ŝi pendtintilo,  
kaj min ŝi skuis, kiel povis.  
Trezoron por la fianĉino,  
amanto bona min ne trovis.  
Al la fajruj' krevita mia,  
per lakto kreska vivo mia  
kunsuferanton mi ne trovis.

Nun tre bezone, Dio benu  
sian bovleton, mian koron,  
gardeme per du manoj tenu,  
ja ŝi mesaĝas nur angoron.  
Ŝi mavis, bonis, kiel homo –  
Jam nek malbono, jam nek bono,  
sed eblas ami ŝin: memoron.

**Lulado**  
*Ringató*

Lulaj ondoj kanaj,  
lulaj ondoj lagaj  
en serena bluo  
sur ondetoj vagaj.

Eble ŝia amo  
brilos al fremdulo,  
sed li same lulu  
ŝin per tia lulo.

## **Fruntkaresu**

*Tedd a kezed*

Fruntkaresu  
min kun amo –  
por mi propru  
via mano.

Gardostaru  
kun murdemo –  
por vi propru  
mia memo.

Amu plene  
sen angoro –  
por vi propru  
mia koro.

*1929*



## **Bet-Leĥem**

### *Betlehem*

En nebulvindoj korvoj molaj aras,  
malhelo nestas sur la splenaj heĝoj.  
Sur argiloplankon de kabano falas  
bastonaj du paŝtistoj kaj tri reĝoj.  
Descendas ino sur kamer-eskalo, –  
„Anĝel' de dio! " – uloj kvin arias.  
Taglaboristo sterkas en la stalo,  
kokinoj hirtaj malsat-plende krias.  
En frosta pajlo ŝrumpas la terpomoj,  
de la tegmento mornas kanmentono,  
konsole krispas supo kun aromoj  
ŝvebantaj kun la kanto al plafono.  
Jesuo loĝas en kajero flava,  
inter kuŝantaj brutoj ĝoje satas,  
kaj la piuloj en flambriilo rava  
ĉirkaŭ la trogo ŝajne eksaltadas.  
Mensogo. Pajlo-porcieton pelas  
sinjora vento dum hungaroj ŝvitas;  
la du paŝtistoj per kukaĵoj ŝvelas,  
kaj la tri reĝoj en brandaĉon ridas.

*1930*

## **Fumo**

### *Füst*

Fumeto svelta floras antaŭlune.  
Arĝente soras, falas sinkonsume.  
Saturas ĝin ĉiela malvarmeto.

Suferis multon mi – do mi maldikas  
kaj soros, se tagzorgoj min malligas,  
saturas min ĉiela malvarmeto.

Mi soros, sed sovaĝa, ruĝa tremo  
porviva lulas mondon kaj kun premo  
saturas vin, ĉiela malvarmeto.

## **Amaso**

### *Tömeg*

Laboron! Panon!  
Laboron! Panon!  
Venas la amaso! Venas la amaso!  
Timaj muŝoj de l' surfaco,  
flugas ŝtonoj por frakaso.  
Sparkoj etaj, sparkoj siblaj,  
alrigardoj nun ekvibraĵoj  
pro ferstanga bato sur la nazo.  
La amaso:  
marŝanta arbarmaso,  
ĝi haltante sangradikas.  
Polme, plande humo dikas.  
Centmil montoj ĝin satigas,  
ĝian trinkon nuboj kovras,  
kvankam nuboj montojn volvas,  
la amaso panavidas.

Panopaste sin ekĵetas,  
sin ĵetadas kaj sin knedas  
la amaso.

Pufa praĉela bazo,  
la antenojn ĝi malvolvas,  
amebe sin trenas, solvas,  
aliajn tuberojn ĝi rekovras.

Mondon glutos ĉi-amaso!  
La naztruoj nubojn blovas.  
Ĝiaj dentoj  
ronda vic' de lu-kazernoj.  
Ĝi kaptadas, preni trovas  
grenejojn, fabrikojn, brutojn,  
sephoran laboradon,  
Grandan Ursinon, Plejadon,  
abundakvajjn putojn –

Miaj patroj sin kurbigaj,  
karaj filinoj maldikaj:  
la amaso.  
Pafoj, kiel fulmopaso.  
Pikas torenton pajlero, –  
kaptas, portas ĝin kolero,  
torde puŝas ĝi la barojn,  
la kestaĉojn kaj la ĉarojn,  
polic-ĉakojn kaj -ĉevalojn,  
la minac-levitajn glavojn –

Ho!  
Vanas ja ceteraj fortoj,  
humilaj, marĉandaj vortoj!  
Ĉar ĝi estas  
konstruaĵo, konstruanto,  
fundamento kaj tegmento,  
laboranto kaj plananto –  
Vivu kamparanoj, laboristoj  
sen damaĝa ruzo de filistroj,  
mil piedoj ĝin distretu, –  
hu! amaso, pretu, pretu!

*1931*

## Mia patrino

*Anyám*

Poteton prenis ŝi dumane  
dimanĉe kiam ekvesperis,  
ŝi milde-mute ekridetis  
kaj iom sidis duonombre –

De l' ekscelencoj sian propran  
manĝeton ŝi por ni alportis,  
ni enlitiĝis, mi imagis,  
ke tiuj manĝas plenan poton –

Mia patrino mortis frue,  
ja lavistinoj frue mortas,  
pro ŝarĝoj tremas la piedoj,  
la kap' doloras pro gladado –

Mont-panoramo: lavotaĵoj!  
Nub-ludo por freŝigi nervojn:  
vaporo, kaj por lavistino  
la klimatsanĝo: subtegmento –

Mi vidas: haltas ŝi en glado.  
Ŝian fragilan korpon rompis  
la kapitalo: ŝi etiĝis –  
pripensu tion, ho proletoj –

Pro lavo ŝi kurbiĝis iom,  
kaj mi ne sciis, ke ŝi junas,  
ŝi songis antaŭtukon puran,  
ŝin la poŝtist' salutis tiam.

## **Meditante**

### *Tŭnódo*

#### *Ŝtormo*

Skarabon kiel infaneto prenis,  
dufingre mi ĝin sub akseloj tenis  
kaj murmuradis: jen, la ŝtormo, sciu! ...  
Kaj baraktadis ĝia fulmo ĉiu.

#### *Morusarbo*

Mezvoje morusarbo olda solas:  
kampara panjo forta pro la luktoj.  
Ŝoforo, gardu vin! La trunk' malmolas!  
Sed almozulo, por vi molas fruktoj.

#### *Kristano*

Malsate inter stakoj mi azilas,  
karesas min ĉagreno.  
Stelaro mian kapon ĉirkaŭbrilas  
kiel dornoza diademo.  
Malema mi kristane malaspiras  
ĝis venos militemo.

#### *Ventoj*

Pro ventoj la rozuj' ĉiela krevas,  
velkante gira vesperiĝo ŝvebas,  
petaloj kovras genton de subpremo,  
kun ili ludas brizo de ĉagreno.

#### *Literoj*

Ludeto nur. Skribita per krajono,  
ĝin mi aĉetis per sinjora mono.  
Ankoraŭ ne pafbruo ĉi litero –  
pedike pikas kiel la mizero.

## Frosto

### *Fagy*

Aŭtune cerbumadis brave,  
kaj nun zorgeme pretus neĝi,  
fenestron de la frost' rigida  
frapas vetero incitita.

Jen, tempo de la bankieroj  
kaj generaloj: tiu nuno,  
tiu forĝita frosto brila,  
tiu tranĉile akra tempo.

La firmamento armon muĝas.  
Trapikas tiu frosto pulmojn  
kaj nudajn brustojn sub ĉifonoj –  
jen, tempo ŝrika akrigile.

Malantaŭ ĝi kiom da mutaj  
malvarmaj panoj kaj ladkestoĵ,  
arego da rigidaj aĵoj –  
jen, la montrofenestro-tempo.

Kaj krioj: „Kie tiu ŝtono,  
tiu ferstango? Batu ĝin jam!  
Rompu ĝin jam! Enpaŝu jam ĝin! ...”  
– Ho, tempo de kia vetero –



*1932*

## Urboranda nokto

*Külvárosi éj*

Lumoj el la kort' profunda  
sian reton jam elprenas;  
kiel kavo akvofunda,  
nia ĉambro ombroplenas.

Muto – rampe ekpiedas  
la lavbroso kun oscedo;  
super ĝi jen fali pretas  
hezitanta murpeceto.

La nokto haltas surĉiele,  
en ĉifonoj ĝemas;  
urborande lokon prenas.  
Tra plac' ekamblas ĝi sencele,  
prenas iom da lun' por esti hele.

Mornas plie ol ruinoj  
la uzinoj,  
sed ene  
masiviĝas la malhelo plene,  
bazo de silento.

Tra lukoj de teksaffabrikoj  
lunlumo falas;  
en faskoj aras,  
fadene lunradioj palas  
sur la teksiloj monstre krudaj;  
tranokte, dum senfare staras,  
teksadas morne la maŝinoj  
sonĝetojn de la teksistinoj.

Apude, kiel volbaj kriptoj,  
cemento-, fero-, ŝraŭbfabrikoj.  
Jen, familiaj tombosinoj.  
Konservas tiuj ĉi uzinoj  
sekreton morne resurekti.  
Sur !a barilo kato gratas,

noktogardisto superstiĉa  
fantomon, lucern-signon vidas –  
kaj la dinamoj skarab-dorsaj  
en metalbril' tepidas.

Vagonarfajfo.

Palpas malsek' en ombrogarbo,  
en branĉoj de falinta arbo,  
kaj plipezigas la vojan polvon.

Survoje policano, laborulo.  
Kun flugfolioj en obskuro  
jen kamarado.  
Li, kiel hundo, esplor-flaras  
kaj, kiel kato, orelumas;  
dangêras, kie lampo lumas.

La drinkejbuŝ' lumaĉon vomas,  
ĝia fenestro flakon ŝvitas,  
interne lampo sinke dronas,  
taglaboristo sola sidas.  
La drinkejmastro dorme soras.  
Sed li al mur' grimacas iom,  
altajdas lin amar' – li ploras.  
Vivuas la revolucion.

La akvoj klakaj pli rigidaj  
ol ercoj elgisitaj.  
La vento kiel hund' vaganta  
alkuras akvon, ĝia granda  
lango la akvon voras.  
La pajlosakoj, kiel flosoj,  
ŝvebmutas sur la noktaj ondoj –

Tenejo barke sin ellevas  
kaj ferboate gisuzino,  
gisisto ruĝan bebon revas  
mildeti en la gisuj-sino.

Ĉio malsekas, ĉio pezas.  
Pri la landaro de I' mizero

la ŝim' mapon jen sintezas.  
Kaj tie sur la kalva tero,  
sur herb-ĉifonoj jen papero,  
ĉifonoj. Ili rampus! Tremas,  
sed eki jam malfortas...

Via malseka vent' obskura:  
flirtado de tukeg' malpura,  
ho nokto!  
Perkalo ŝnure: sur ĉielo  
vi pendas kiel la sufero  
survive, ho nokto!

Nokto de malriĉuloj! Braĝo  
vi estu por la kor' – kuraĝo,  
elfandu feron en mi febran,  
amboson firman, nerompeblan,  
martelon tinte fulmomovan,  
– susuran klingon venkotrovan,  
ho nokto!

Noktas peze, noktas ŝlime.  
Fratoj, dormos ankaŭ mi jam.  
Ne suferu ni anime.  
Verm' evitu korpon nian.

## **Flavaj herboj**

### *Sárga fíivek*

Flavaj herboj intersablas,  
ostokraka vento veas,  
flakoj brute nur probablas,  
paca maro epopeas.

Mi zumkantas inventare.  
La patrujo jen mantelo  
ŝtelvendita nigravare –  
tedas min ĉi versmuelo.

Korarifo de la svarma  
tempo glimas: morta mondo –  
arbo, ino, dom' malvarma  
tra l' ĉiela blua ondo.

*1933*

## Senespere

### *Reménytelenül*

#### *Lante, revante*

Sed oni fine jen alvenas  
sur marĉa, sabla, trista tero,  
kontemplas reve, kapon tenas  
prudente, saĝas sen espero.

Sen trompo ankaŭ mi ekstrebas  
kontempli saĝe kaj leĝere.  
Arĝenta hakilsvingo ŝvebas  
sur popla foliar' mistere.

Nenio-branĉon sidas koro,  
etule tremas sen kolero;  
alaras milde el la foro,  
ĝin spektas, spektas ĉiu stelo.

#### *En firmamento*

En firmamento ferkolora  
dinamo rotacias pende.  
Ho, muta vi stelaro fora!  
La vortoj sparkas interdente –

Pasinto mia: la senbrua  
ŝtonaro de traspaca falo.  
Forsvingas sin la tempo blua.  
Glavakron brilas ia hararo –

Super la lipoj pasintgustaj  
raŭpdikas la lipharoj vaste.  
Doloras koro, vortoj rustaj.  
Sed kiun mi alvoĉu laste –

## Odo

### *Óda*

1

Jen, mi sidas sur la rok' de glimoj.  
Tra la somero  
svelta brizo ŝvebas kiel varmo  
de kunmanĝo dum vespero.  
Sorbas mian koron malalarmo.  
Ne malfacilas –  
svarmas ai mi are la iamo,  
klinas sin la kapo, kaj la mano  
humilas.

Mi rigardas la montaron –  
vian frunto-klaron  
la folioj re-rebrilas.  
Nun la voj' ne iun gvidas,  
via jup' – mi tamen vidas –  
en vent' subtilas.  
Vidas mi sub delikataj frondoj  
viajn harojn en disfalaj ondoj,  
viajn molajn mamojn pulse rondi,  
kaj en la forkuro de rivero  
mi revidas sur ŝtonero  
ĉiu, jen sur viaj dentoj  
!a feinan ridon ek-ekfonti.

2

Mi amegas vin, ho, kiom flame,  
kiu universojn de la foro  
kaj insidan, ruzan solecegon  
en profundaj kavoj de la koro  
ekvoĉigis same.

Propran bruon kiel akvofalo  
min forlasas, kuras vi al muto mara,  
kaj mi inter rokaj pintoj de fatalo  
tondras, ŝrikas vaste per sinpelo  
batiĝante inter tero kaj ĉielo,  
ke mi amas vin, kruela-kara!



3

Amas mi vin kiel fil' patrinon,  
mutaj grotoj kiel propran sinon,  
amas mi vin: ĉambroj kiel lumon,  
korpo la kvieton, flamon la animo,  
amas mi vin kiel vivan sunon  
mortemuloj amas ĝis la fino.

Vin mi gardas en la movoj, vortoj, ridoj,  
kiel tero ĉion falan al si ligas.  
Mi en cerbo per instinktoj, per acidoj  
fiksas vin neniam malapera,  
vi kara, bela,  
ĉiun sencon tie vi plenigas.

La minutoj fortiriĝe knaras,  
sed vi sidas inter orelmuroj,  
steloj ekbrilegas kaj subfalas,  
sed vi fikse firmas en okuloj.  
Kiel mutoj en la groto solas,  
vi arome en la buŝ' pendolas,  
via mano delikat-vejnara  
sur la glas' kristala  
ekaŭroras.

4

Ho, mi estas kia materialo,  
kiun tranĉas, formas vi per vido gema?  
Kia lumo kaj kia animo,  
kia fenomeno de sublimo,  
ke mi migras tra I' nenio-nebularo  
sur pejzaĝoj de via korp' fruktema?

En aperta menso kiel vorto vera,  
malleviĝas mi en via mem' mistera! ...

Viaj vejnoj, kiel la rozuoj,  
senĉese tremas.  
La kurent' eterne kuras, por ke  
survizaĝe floru via amo,  
kaj utere fruktu la benita flamo.

La senteman humon de stomako  
la radikoj en zigzago  
brodas, ĉiu eta brako  
kunplektiĝas en reago –  
por ke kunariĝu ĉiu ĉelo-lago  
kaj la frondaj pulmoj en torako  
fiustru gloron de spir-vago.  
La materio marŝas jen feliĉe  
tra tuneloj de intensoj svarmaj,  
la skorion revivigas riĉe  
bolaj putoj de la renoj varmaj.

Ondo de montetoj ekvilibras,  
en vi bildo de stelaroj vibras,  
zumas lagoj kaj fabrik-demonoj,  
svarmas besto-milionoj,  
ŝarkoj,  
algoj,  
la kruela kaj la bona kerno;  
sunoj brilas, blankaj noktoj diafanas,  
kaŝe en vi mem titanas  
senkonscie la eterno.

5

Kiel bula sango gutas,  
antaŭ vin jen falas  
tiuj vortoj.  
Nun la viv' balbutas,  
nur la leĝo pure klaras.  
La organoj, kiuj min renaskas  
ĉiutage, ekmutante jam fiaskas  
armi sin per fortoj.

Sed nun ili ĉiuj krias –  
Elektita el areg' de homoj,  
el la dumil milionoj,  
ho vi, unusola,  
lito viva, tombo forta, vi lulilo mola,  
min akceptu en vi! ...

(En aŭroro soras la ĉielo!

Aroj glimas en la erca foro.  
La okulojn vundas tiu helo.  
Mi perdiĝos en angoro.  
Super mi tre alte krakas,  
batas mia koro.)

6

*(Flanka kanto)*

(Min portas trajno proksimiĝe  
vin eble trovos mi feliĉe,  
ekpacos eble tiu flamo,  
kaj eble diros vi kun amo:

Jen, por vi bano jam varmetas!  
Jen, por vi mola tuko pretas!  
Jen, manĝo por la apetito!  
Por kuŝi jen, komuna lito.)

*1934*

## **Sin lulas**

### *A fán a levelek*

Sin lulas sur tilioj  
mole la folioj –  
ĉiuj kurbas, flavas,  
velke molas.

Jen birdo senkonsola  
iras-venas sola –  
kvazaŭ kaĝe sklavas  
inter ili.

La kanto en mi same  
serĉas fuĝon vane –  
lulan ombron havas:  
la silenton.

*1935*

## Lulkanto

### *Altató*

Okulon fermas la lazur',  
la kampo dormas sub kovril',  
okulojn multajn fermas mur' –  
ekdormu bele, eta fil'.

La kapon klinas al pied',  
skaraboj dormas mil kaj mil,  
kun ili dormas zumzumet' –  
ekdormu bele, eta fil'.

La tramo dormas kun plezur',  
susuras ĝia sonoril',  
kaj songe mildas la vetur' –  
ekdormu bele, eta fil'.

Surseĝe dormas la mantel',  
dormetas kun ĝi ĉiu ŝir',  
finita por ĝi !a sufer' –  
ekdormu bele, eta fil'.

Ekskurso dormas ĉe river',  
dormetas pilko kaj fajfil',  
kaj dormas dolĉo en suker' –  
ekdormu bele, eta fil'.

La foro estas vitra glob',  
ricevos ĝin vi por admir',  
kaj dia estos via pov' –  
ekdormu bele, eta fil'.

Soldato estos vi sen tim',  
paŝtisto kiel en dezir',  
ekdormas, vidu, la patrin' –  
ekdormu fine, eta fil'.

*1936*



## **Epitafo por hispana kampulo**

*Egy spanyol földműves sírverse*

Min pertrudis Franco, rekruton, krude batali,  
min obeigis tim', ĉar mortpafo la pun'.  
Pro la timeg' mi batalis kontraŭ la justo, libero  
sur la mur' de Irún. Venis, spite, la mort'.

## **Ve, la pasia amo...**

*Jaj, majdnem...*

Ve, la pasia amo min distretas.  
Ve, la premega timo min hermetas.  
Kunmorti en brakumo foja,  
virinoj, kiu pretas?

Somero kuras, vintro nur lantetas.  
Aŭtuna kubo kiun pot mi ĵetas?  
Trompe la karnpgardistan tempon,  
kunfuĝi kiu pretas?

La steloj surĉielen kradon metas:  
en kelo de l' racio mi vegetas.  
Ĉi-universon kun mi rompi,  
virinoj, kiu pretas?

## **El-elsaltas**

*Ki-be ugrál*

Mi sentas: el-elsaltas la okuloj.  
Kiam mi frenezigos, ne batemu.  
Min bele-milde kaptu du fortuloj;

se strabos mia tuta memo, venu  
sen montri pugnojn – mi senvide sklavos.  
El la nenio ne plu min retrenu.

Pripensu bone: Mi ĉi-monde havas  
neniun kaj nenion. Eĉ la „memo”  
ne plu ekzistas. Ĝi pli kaj pli kavas

dum finfariĝas tiu ĉi poemo...  
Min reflektore sondas sen intimo  
rigardo nuda: Kial ĉi geheno,

ke vanas vokoj de mia animo,  
ke min malamas ĉiu sen kompreno.  
Ne kredu jam pri mia stulta krimo

ĝis min absolvos humo kun glutemo.

## **Du heksametroj**

*Két hexameter*

Kial digne honesti? Min ja tombo atendas!  
Kaj kial ne honesti? Min ja tombo atendas!

*1937*

## **Misteroj** *Rejtelmek*

Se misteroj sonoretas,  
gardostaras mi fabele.  
Vi ĝiskolan pezon metas  
min vestante perfidele.

Vokas vento, vokas foro,  
vi ekruĝas se komprene.  
Vokas sonoj, vokas koro,  
ekhumilas persvademe.

Kantas ankaŭ mi poeme:  
se mi amas vin amindan,  
faru ke mi portu eme  
ĉi fidelon min vestintan.

## **Poemo, flugu...**

*Szállj költemény...*

Poemo flugu, portu veron,  
aparte ek al ĉiu-ĉiu:  
ni havas vivon kaj esperon  
kaj tempon – ĉiuj ni konsciu.

Pacigu la riĉulajn timojn:  
indulgos juste la severo.  
Bezonas fontojn, ne viktimojn  
la sento „amo kaj libero“.

Alvoku ĉiujn mildasone  
la malriĉulojn, kiuj febras –  
klerigu ilin: ne bezone  
esti heroo, se ne eblas.

## **Je mia naskiĝtago**

### *Születésnapomra*

Tridek dua datreveno –  
jen, surprizo ĉi-poemo,  
feno-  
meno:

ĉar mi sola devas pleje  
la donacon ĉi-kafeje  
formi  
por mi.

Jen, tridek du jaroj foras,  
sed min riĉo ne favoras  
mala-  
vara.

Ĉiu revo iĝis nula,  
kaj nun devas malriĉula  
plumi  
plu mi.

Jes, la revojn la magnato  
de la universitato  
tre dis-  
tretis.

Pro poem' „Kun pura koro”  
frapis min la malfavoro  
krude,  
nude,

kun glavego li defendis  
la patrujon, kaj min sendis  
ata-  
kata.

Kriebrias li sangvine:  
„Ĉiam luktos mi, ke vi ne  
instru-  
istu.”

Antal Horger, al vi ĝojo  
pri forpelo eĉ por fojo  
ne plu  
eblu!

Genton, eĉ ne meznivele  
jen, instruos tamen vere  
ĉiam  
mi jam!

## **Tiu legu...**

*Csak az olvassa...*

Tiu legu ĉi-poemon,  
kiu amas mian memon,  
kiu ŝipas la nenion,  
pri l' estonto havas scion,

ĉar aperis dum la dormo  
la silento en homformo  
kaj restadas en la koro  
tigro kun la kapreolo.

## **Karulino malsana**

*Kedvesem betegen...*

Kuŝas en malsano  
ŝi en matenbrilo.  
Nun trankvilo amo,  
amu nun trankvilo.

La infanon kleran  
febros stulta ligas –  
min ne kunsuferan,  
min nur humiligas.

Kiel por doktoro  
iu kure kuras,  
tiel min la koro  
krude nur tamburas.

Bato ĉu, infano,  
estus la deziro?  
Nur trankvilo, amo.  
Amo kaj trankvilo.

## **Jen, mi jam trovis la hejmlandon...**

*Íme, hát megleltem hazámat...*

Jen, mi jam trovis la hejmlandon,  
la teron, kie senerare  
super min skribos mian nomon  
la sepultantoj tombofare.

Min glutos tero almozkeste,  
ĉar nebezona (ho, damnito!)  
la senvalora fermonero,  
kiun postlasis la milito.

Nek la ferringo kun la vortoj  
ĉizitaj: nova mondo, tero,  
justeco. – Ni milite vivas:  
pli belas ora koliero.

Mi estis sola longe-longe.  
Kaj venis homoj min renkonte.  
Vi solas, ili diris: kvankam  
mi estus kune tre volonte.

Mia ekzisto, vivo vanis –  
konstatas eĉ mi mem faciie.  
Min oni traktis frenezulo,  
eĉ morti estas senutile.

Dumvive mi en turnoventoj  
streĉite ĉiam firme staris.  
Ridinde, ke mi kulpis malpli  
ol oni al mi malbonfaris.

Belas printempo kaj somero,  
sed vintro pleje belas  
por tiu, kiu familion  
jam nur por aliaj esperas.

## **Eroj**

### *Töredékek*

#### *Poeto-amo...*

Poeto-amo: pajloflamo,  
digesta tial kun elano.

#### *Ne estu spita...*

Ne esiu spita.  
Kvankam eĉ pli ekspluatita –  
labori nur precize, bele,  
kiel se iras stel' ĉiele,  
tiel valoras.



*Kie libero...*

Kie libero la reĝimo,  
por mi sentebblas la senlimo.

Ho, patrino, panjo...

Ho patrino, panjo, vidu, pretas, ankaŭ, ve, ĉi poemo!

*Patrino kara, unusola...*

Patrino kara, unusola,  
dehiska virgulino flora,  
feliĉo la propradolora.

Mi kreas dion (korsuferon),  
por vin viviĝi, la ĉielon,  
por mi obean postaperon!

*Mondaron tutan mi estradas...*

Mondaron tutan mi estradas,  
vitroglobetojn mi kolektas.  
Ja riĉuloj min ne ŝatas:  
infano orfa mi aspektas.

*Kiuj pri la frenezulo...*

Kiuj pri !a frenezulo plue pensas, karaj amikoj,  
al vi skribas mi nun tie ĉi, apud la flanko de forno,  
kien mi retiris min por varmi kaj por vin rememori.  
Ĉar en mi, miksiĝis kun la frosto de vespero novembra  
la malĝojo solviĝema, malrapide kaj apenaŭe.  
Ankaŭ vi memoru tie, kaj ne nure nur ridegante  
pri mi, kiu vivis inter vi, kiun vi amis iame.

## **Ne estas senkulpigo**

*Tudod, hogy nincs bocsánat*

Ne estas senkulpigo,  
do vanas sinkulpigo.  
Destine estu viro,  
reverdas post vi tigo.

Kulpo ne malpeziĝas,  
ĝin larmoj ne forviŝas.  
Almenaŭ danku tion,  
ke pruvon vi mem kliŝas.

Ne ĵuru, ne akuzu,  
vin trompe ne fiuzu.  
Ne subu, ne subigu,  
tumulte vi ne ruzu.

Postreste nur manovru,  
sekretojn ne malkovru.  
Homaron malestime,  
vi homas ja, ne povru!

Memoru, vi stertoris,  
petege vane ploris.  
Vi en propra proceso  
vin me denunci povis.

Vi vokis en defio  
pastron anstataŭ dio.  
Kaj vi retrovis bubojn  
en psikoanalizo.

Vi fidis logajn kantojn,  
pagitajn patronantojn.  
Vi ne ricevis laŭdojn,  
nur vantajn fidemandojn.

Iu vin amis trompe,  
vi trompis amorompe.  
Pafilon ŝargu, celu  
al via kor' aplombe.

Pricipojn vi forĵetus,  
vi fide ami pretus,  
ja hunde vi konfidus  
tiun, kiu vin kredus.

